

MALKOVRU ESPERANTON



FASCINA LINGVO



1. Bazaj informoj pri Esperanto.....	03
2. Lingva prezenteto de Esperanto	10
3. Personaj rakontetoj pri Esperanto.....	12
4. Zamenhof, iniciatinto de Esperanto.....	17
5. Esperanto el psikologia vidpunkto	19
6. Kutimaj demandoj pri Esperanto.....	21
7. Lokaj informoj pri Esperanto	23

Kara leganto,

Ĉu vi iam emis rakonti al aliaj pri bona filmo aŭ interesa libro aŭ io alia kion vi ŝatas? En simila maniero ni emas rakonti pri Esperanto. Ni tre ŝatas tiun lingvon kaj pro tio volas ke ankaŭ aliaj sciu pri ĝi kaj kiom taŭga ĝi estas por internacia komunikado.

"Ni" en tiu ĉi konteksto estas homoj el diversaj landoj kiuj multe uzas Esperanton en internaciaj kontaktoj. Krome ni aktivas en la organizoj kiuj kunlaboris por aperigi tiun ĉi broŝuron: E@I kaj ILEI (prezentoj venos sur paĝo 7).

La enhavo konsistas el sep partoj. Unue ni donas kelkajn bazajn informojn pri Esperanto. Due venas mallonga lingva prezento de Esperanto. Kiel tria parto sekvas personaj rakontoj de homoj kiuj multe uzas Esperanton. La kvara estas mallonga priskribo de la laboro de L.L. Zamenhof, kiu kreis la bazon de Esperanto. Kvine, psikologo traktas internacian komunikadon kaj Esperanton el psikologia vidpunkto. Sese ni respondas al kutimaj demandoj pri Esperanto. Sepe legeblas informoj pri la Esperanto-movado en via lando kaj regiono.

Kiel dirite, ni tre ŝatas Esperanton kaj se tiu ĉi broŝuro iom interesigos vin pri tiu fascina lingvo, tio ĝojigos nin.

Agrablan legadon!

Teamo de E@I

PS: Se vi post tiu ĉi broŝuro ŝatus legi novaĵojn rilate al Esperanto, vidu www.aktuale.info. 



La projekto ricevis financon subtenon de la fondaĵo Olle Olsson kaj la Ido-fondaĵo memore al Hellmut Rahnish.

Aspektigisto: Stano Marček.

La broŝuro estas libere elŝutebla en pluraj lingvoj ĉe www.ikso.net/broshuro. Oni rajtas ĝin kopii, disdoni kaj uzi por nekomercaj celoj kondiĉe, ke ĝi estos kopiata senŝanĝe kaj inkluzive de tiu ĉi kopirajta teksto. Alia uzo de la enhavo eblas nur kun konsento de E@I kaj ILEI, pri tio kontaktu nin per la adreso: broshuro@ikso.net

1. Bazaj informoj pri Esperanto

Esperanto estas lingvo, kiel aliaj homaj lingvoj. Oni povas esprimi sentojn kaj pensojn en Esperanto, same kiel oni faras en aliaj lingvoj. Eblas kanti en Esperanto, krei poezion, kvereli, ami, klaĉi, ŝerci, science diskuti, konsoli, ludi ktp ktp.

Ankaŭ eblas skribi en Esperanto, jen iuj ekzemploj:

- ◆ Esperanto estas lingvo.
- ◆ Ni havas revon.
- ◆ La suno brilas.
- ◆ Ĉu vi vidas min?
- ◆ Jes, mi vidas vin.
- ◆ Mi amas vin!

La naciaj aŭ etnaj lingvoj apartenas al apartaj homgrupoj. Ekzemple la hungara apartenas al la hungaroj, la portugala al la brazilanoj kaj portugaloj, la japana al la japanoj ktp.

Tiel ne estas pri Esperanto, ĝi ne apartenas al iu aparta nacio aŭ popolo, ĝi apartenas al ĉiuj kiuj lernis ĝin, sendepende de nacieco, loĝloko ks. Esperanto ne estas nacia lingvo, sed internacia lingvo kun parolantoj en ĉiuj mondopartoj.

La ĉefa celo de Esperanto estas faciligi kontakton kaj komunikadon inter homoj, kiuj ne havas komunan gepatran aŭ landan lingvon. Laŭ niaj spertoj Esperanto estas aparte taŭga lingvo por internacia komunikado inter "ordinaraj homoj" kiuj interesiĝas pri aliaj landoj kaj popoloj.



"Por mi Esperanto estas bonega lingvo por teni kontakton kun amikoj ĉirkaŭ la mondo kaj por labori en internaciaj projektoj."

Peter Baláž
kunordiganto de E@I

Unu homo, L.L. Zamenhof, ellaboris la bazon de Esperanto. Tion li faris, kreeme kaj zorge, uzante naciajn lingvojn kiel fonton kaj inspiron, dum ĉ. 10 jaroj. Nur kiam li sentis ke la lingvo ekhavis sian "propran spiriton", li volis prezenti ĝin al la ĝenerala publiko. Tio okazis en la jaro 1887 per eldono de libreto kun la nomo Lingvo Internacia.

En la libreto Zamenhof uzis la pseŭdonimon Doktoro Esperanto, sed poste la vorto Esperanto fariĝis la nomo de la lingvo mem. En la sekvaj jaroj la libreto disvastiĝis al lingvemuloj kaj idealistoj en pluraj landoj kiuj lernis la lingvon kaj ekuzis ĝin en internacia komunikado. Tiumaniere Esperanto evoluis de unuhoma lingvoprojekto al vivanta internacia lingvo. Hodiaŭ Esperanto estas uzata

kaj ŝatata de centmiloj aŭ eĉ milionoj da homoj ĉirkaŭ la mondo.

Povas soni sufiĉe nekredeble ke unuhoma lingvoprojekto sukcesis evolui al vivanta internacia lingvo, uzata kaj ŝatata de multaj homoj, ĉu ne? Tiu ĉi broŝuro mallonge klarigas kiel kaj kial tio povis okazi. La broŝuro ankaŭ montras kiel Esperanto estas uzata hodiaŭ ĉirkaŭ la mondo. Plulegu kaj vi baldaŭ scios pli pri Lingvo Internacia (la origina nomo de Esperanto).



L.L. Zamenhof (1859-1917),
iniciatinto de Esperanto

1.1. Uzkampoj de Esperanto

Ĉiutage homoj uzas Esperanton diversmaniere, ekzemple dum vojaĝoj, en konferencoj, en interreto, en sia laboro aŭ en la familia vivo.

"Mi uzas la serban kun miaj infanoj, la anglan en miaj studoj, la svedan en la socio kaj Esperanton en mia laboro kaj kun mia edzo. Ĉiuj lingvoj havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. El la kvar lingvoj kiujn mi uzas ĉiutage, Esperanto estas tiu lingvo en kiu mi sentas min plej komforta."



Sonja Petrović Lundberg,
kunordiganto de www.lernu.net

Kutime oni uzas Esperanton kun homoj kiuj ne havas saman gepatran lingvon kiel oni mem. En tiaj kontaktoj Esperanto funkcias kiel "pontolingvo" inter homoj kun malsamaj lingvofonoj. Ĝuste tio estas la forta flanko de Esperanto, ke ĝi bone funkcias kiel "ponto" aŭ kvazaŭ "gluo" inter homoj en internaciaj kontaktoj.

Unu maniero uzi Esperanton estas vojaĝi al internacia Esperanto-aranĝo kie renkontiĝas homoj el pluraj landoj. Partopreni aranĝojn kun homoj el diversaj landoj kaj kun ili diskuti, interŝanĝi ideojn, kanti, danci, ekskursi ktp estas tre ŝatata afero de multaj Esperanto-parolantoj. (Ekzemploj de tiaj aranĝoj venos poste.)



Alia maniero uzi Esperanton estas vojaĝi en fremda lando kaj gastigi ĉe Esperanto-parolantoj senpage. Kiam oni loĝas en hejmoj de ordinaraj homoj en fremda lando oni kutime ricevas pli bonan bildon de la kondiĉoj kaj kutimoj en tiu lando ol oni ricevas loĝante en hotelo. Ekzistas reto de gastemaj Esperanto-parolantoj kun la nomo Pasporta Servo. En ĝi ekzistas ĉ. 1 200 adresoj en pli ol 90 landoj.

Eble la plej utila afero pri Pasporta Servo estas ke per ĝi oni ne devas multe plani, sed povas spontane iri kien oni volas laŭ siaj emoj.

Amanda Higley, Usono,
kiu vojaĝis tra Eŭropo dum 16 monatoj, kaj pagis por nur tri tranoktoj



Tria maniero uzi Esperanton estas korespondi kun Esperantistoj per leteroj aŭ per interreto, por tiel ekhavi kontakton kun homoj el aliaj landoj rapide kaj facile.

Interreto forigas la fizikan distancon kaj Esperanto forigas la 'lingvan distancon'. Do, interreto kaj Esperanto estas bonega paro por internacia komunikado!

Henning Sato von Rosen,
unu el la fondintoj de E@I

Aliaj manieroj estas aktivi en la Esperanto-movado, por pli bona/paca mondo, legi novaĵojn pri okazaĵoj en diversaj landoj verkitajn rekte de homoj kiuj loĝas en tiuj landoj, aŭ ĝui librojn origine verkitajn en malgrandaj lingvoj, kiuj ne estas tradukitaj al onia gepatra lingvo, sed jes al Esperanto.



1.2. Internaciaj Esperanto-aranĝoj

Jen kelkaj ekzemploj de popularaj internaciaj Esperanto-aranĝoj en la mondo:

HIMALAJA RENKONTIĜO



La Himalaja Renkontiĝo havas fortan turisman karakteron. Ĝi konatigas la partoprenantojn kun la vivo kaj vidindaĵoj de Nepalo sub la gvido de lokaj esperantistoj. Kutime oni faras iom pli longan ekskurson ekster Katmandu, la ĉefurbo de Nepalo, dum kiu la nepalaj kaj eksterlandaj esperantistoj havas eblecon kunvivi, konatiĝi unuj kun la aliaj kaj praktiki la lingvon en ekzotika medio.

INTERNACIA JUNULARA KONGRESO – IJK



Bonega aranĝo por ĉiuj junaj Esperanto-interesiĝantoj. Dank' al la neformala kaj vigla etoso estas facile trovi novajn amikojn el diversaj landoj kaj ekkoni la internacian junularan Esperanto-movadon. Partoprenantoj venas ofte el ĉirkaŭ tridek landoj kaj nombras kelkcentojn. Ĉiujare la kongreso okazas en nova lando/loko.

JUNULARA E-SEMINARIO – JES



Amuza kaj festeca semajno ĉirkaŭ novjaro ie en Eŭropo. Enhavas seriozajn programerojn dumtage, sed homoj estas tie ĉefe por amikumi, danci kaj noktumi.

NORDAMERIKA SOMERA KURSARO – NASK



NASK okazas dum tri someraj semajnoj ĉe universitato en Usono kaj konsistas el intensa lernado de Esperanto en diversaj lingvoniveloj. NASK havas internacian instruistaron kaj studentaron.

KOMUNA SEMINARIO – KS



Kunlabora seminario kiu laŭvice okazas en Ĉinio, Japanio kaj Koreio, por junuloj el ĉefe tiuj landoj. Ĝi okazas ĉiujare kaj funkcias kiel kunligilo de junaj Esperanto-parolantoj en Azio.

KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO – KEF

Kelktaga festivalo kun bunta Esperanto-kultura programo, kun diversaĝa partoprenantaro. La muzikistoj kaj artistoj venas ĉefe, sed ne nur, el Eŭropo. Posttagmeze kaj vespere



estas kutime teatro, prelegoj, diskutoj kaj koncertoj de Esperanto-bandoj. Nokte dancado, trinkejo kaj "gufujo" (trankvila loko por trinki teon kaj babili). La festivalo okazas proksimume ĉiun trian jaron, en norda Eŭropo.

TUT-AMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO – TAKE



TAKE celas plifortigi solidarecon inter la esperantistoj el Norda, Centra kaj Suda Amerikoj, progresigi la Esperantomovadon kaj studi ĝiajn problemojn. Krom la laboraj partoj, la kongreso enhavas ankaŭ multajn klerigajn kaj distrajn programerojn por eduki la partoprenantojn kaj diskonigi la kongresan landon inter la esperantistaro.

UNIVERSALA KONGRESO – UK



La plej granda ĉiujara Esperanto-aranĝo. Universala Kongreso estas kongreso kun diversspecaj programeroj, ĉefe prelegoj kaj kunsidoj, sed ankaŭ koncertoj, teatraĵoj, ekskursoj, dancado ks. Kutime partoprenas inter 2 000 kaj 4 000 homoj el ĉ. 50 landoj. Ĉiujare la kongreso okazas en nova lando/loko.

1.3. Kiel Esperanto iĝis vivanta lingvo?

Povas soni sufiĉe nekredible ke unuhoma lingvoprojekto poste evoluas al vivanta internacia lingvo. Tamen, tiel okazis pri Esperanto kiu nun evoluas simile kiel aliaj lingvoj evoluas. (Ni scias ĉar ni uzas la lingvon ĉiutage.)

Jen la ĉefaj faktoroj kiuj kaŭzis ke Esperanto iĝis vivanta lingvo:

◆ Zamenhof estis tre talenta pri lingvobazkreado

Jam kiel infano Zamenhof komencis cerbumi pri internacia lingvo kaj kiel junulo li decidis ekrealigi siajn ideojn. Kiam li estis 17-jara li montris al siaj lernejoj amikoj la unuan rezulton. Poste li dum ĉirkaŭ dek jaroj ŝanĝadis kaj plibonigadis sian lingvobazon kaj en la jaro 1887 li prezentis ĝin sub la nomo Lingvo Internacia.



◆ Esperanto rapide ekhavis uzantojn en pluraj landoj

Nur kelkajn jarojn post la lanĉo, Esperanto havis parolkomunumon en pluraj landoj kiu uzis, prizorgis kaj ŝatis la lingvon. Multaj interŝanĝis leterojn kaj renkontiĝis kun Esperanto-parolantoj de aliaj landoj. Dank' al tio Esperanto jam de la komenco estis uzata por internacia komunikado en diversaj situacioj.



◆ Zamenhof lasis al la uzantoj decidi la evoluon

Dum la unua granda kongreso de Esperanto-parolantoj, en 1905, Zamenhof deklaris ke ekde tiam li ne plu gvidos la evoluon de la lingvo, sed ke ĉiu uzanto povas influu la evoluon de Esperanto. Tio montriĝis kiel tre grava decido, ĉar en tiu maniero multaj sentis sin parto de la evoluprocezo de la lingvo kaj sekve pli engaĝitaj.

◆ Esperanto havas stabilan kernon kiu preventas subitajn reformojn

Por eviti disputojn pri lingvaj reformoj, Zamenhof proponis ke ekzistu neŝanĝebla kerno de la lingvo, prezentita en la dokumento La Fundamento de Esperanto. La propono estis akceptita en 1905 kaj ankoraŭ hodiaŭ la Fundamento havas stabiligan influon al la evoluo de la lingvo.

◆ Esperanto estas kaj natura lingvo kaj konstruita lingvo

La fonto de Esperanto estas vortradikoj kaj gramatikaj principoj de la naciaj/etnaj lingvoj. Do, kiam oni parolas en Esperanto, oni sentas ĝin natura lingvo. Samtempe Esperanto estas relative facile lernebla pro sia regula gramatiko kaj saĝa vortfarada sistemo kiuj estas la rezultoj de la tre zorge konstruita lingvobazo.



◆ La interna ideo

– komuna, sed libervola ideo bazo

Al Esperanto estas ligita ideologio pri paco kaj frateco inter ĉiuj popoloj kiun oni kutime nomas la interna ideo. Tiu "interna ideo" donas grandan inspiron al homoj kiuj revas pri pli paca kaj bona mondo iam en la estonteco. I.a. dank' al ĝi multaj homoj volonte investas energion kaj tempon en la Esperanto-movadon.



◆ Esperanto ne estas nur eŭropeca lingvo

La vortoj en Esperanto venas ĉefe el eŭropaj lingvoj, sed la gramatiko kaj la maniero kunmeti vortojn havas plurajn similecojn kun la ĉina, la turka kaj aliaj neindeŭropaj lingvoj. La sintakso kaj la kutima stilo de Esperanto estas grandparte slavecaj. Sendepende de gepatra lingvo, Esperanton eblas lerni dum kelkaj monatoj ĝis kelkaj jaroj kaj poste senti ĝin sia lingvo.

Pruvo pri tio, ke Esperanto sukcesis evolui al viva internacia lingvo estas, ke hodiaŭ ĝi havas stabilan parolkomunumon en ĉiuj mondopartoj. Plej multaj lernas la lingvon kiel junuloj aŭ plenkreskuloj, sed ankaŭ ekzistas homoj kiuj parolas Esperanton denaske kiel unu el siaj familiaj lingvoj.

Mi daŭre opinias ke Esperanto estas la plej valora heredaĵo, kiun miaj karaj gepatroj lasis al mi.

Carlo Minnaja el Italio, kiu parolis Esperanton hejme kun siaj gepatroj kaj frato



1.4. Internaciaj Esperanto-organizoj

Por faciligi al uzantoj de Esperanto organiziĝi kaj agadi internacinivele, ekzistas pluraj internaciaj Esperanto-organizoj. Ĉi tie sekvas mallongaj prezentoj de kelkaj el ili.

Edukado@Interreto – E@I

E@I estas internacia laborgrupo kiu instigas kunlaboron kaj komunikadon tra la mondo. La laborgrupo okazigas klerigajn projektojn kaj aranĝojn por subteni interkulturan lernadon kaj uzadon de lingvoj kaj interretaj teknikoj. Ekzemplo de sukcesa E@I-projektoj estas www.lernu.net (multlingva paĝaro por eklerni Esperanton). Hejmpaĝo (multlingva): www.ikso.net



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI

ILEI estas la ĉefa kolektiĝejo por instruistoj kaj edukistoj de Esperanto. ILEI havas sekciojn en pli ol 30 landoj kaj membrojn en pli ol 45. La organizo laboras i.a. pri instruado de Esperanto en lernejoj kaj universitatoj, ĝi ankaŭ okazigas ekzamenojn kiuj testas lingvajn kaj kulturajn sciojn de Esperanto. Hejmpaĝo (en Esperanto): www.ilei.info



Esperantic Studies Foundation – ESF

ESF subtenas esploradojn kaj instruadon de Esperanto kaj de rilataj temoj kadre de interlingva komunikado, aparte en rilato kun alta edukado en Norda Ameriko. La ĉefa demando de ESF, esplorata en diversaj manieroj, estas: "Ĉu mondo eblas en kiu multaj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, kunekzistas en relativa egaleco, kaj komunikado globalskale estas alirebla al kaj riĉaj kaj malriĉaj?" Hejmpaĝo (en la angla): www.esperantic.org



Universala Esperanto-Asocio – UEA

UEA estis fondita en 1908 kiel organizaĵo de individuaj esperantistoj. Nuntempe UEA estas la plej granda internacia organizaĵo por la parolantoj de Esperanto kaj havas membrojn en 117 landoj. UEA laboras ne nur por disvastigi Esperanton sed ankaŭ por vekti diskutojn pri la mondaj lingvoproblemoj kaj atentigi pri la neceso de egaleco inter lingvoj. Hejmpaĝo (multlingva): www.uea.org



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo – TEJO

TEJO estas internacia, nereĝistara junulara organizo fondita en 1938, kiu laboras por antaŭenigi pacon kaj interkulturan komprenon inter junuloj ĉirkaŭ la mondo per Esperanto. Ĝi aktive laboras pri la nuntempaj problemoj kaj temoj de junuloj, aparte rilate al lingvaj kaj kulturaj aferoj. El sia centra oficejo en Nederlando, ĝi kunordigas la laboron de pli ol 40 landaj sekcioj kaj membroj en pli ol 80 landoj. Hejmpaĝo (multlingva): www.tejo.org



Eŭropa Esperanto-Unio – EEU

EEU luktas por lingvaj samrajteco kaj diverseco en Eŭropo. Ĝi opinias samrajtecon nepre enda por vera demokratio, kaj lingvan diversecon ĝi opinias same grava kiel besta kaj planta diverseco por la ekologio. Krome EEU favoras la evoluon de eŭropa identeco harmonie kun naciaj kaj regionaj identecoj. Hejmpaĝo (en Esperanto): www.euroopa.eu



Biciklista Esperanto-Movado Internacia – BEMI

Jen io por tiuj kiuj ŝatas bicikli kaj paroli Esperante samtempe! BEMI regule okazigas diversajn biciklajn karavanojn, ofte ligite al iu junulara aranĝo. Hejmpaĝo (multlingva): www.bemi.free.fr/



Eurokka

La agadkampo de Eurokka estas tutmonda, celante disvolvi kaj disvastigi en la Esperanto-movado, sed ankaŭ ekster ĝi Esperanto-muzikan kulturon, la muzikbandojn kaj artistojn kiuj kantas Esperante. Hejmpaĝo (en Esperanto): <http://artista.ikso.net/eurokka/>



Sennacieca Asocio Tutmonda – SAT

La ĉefa celo de SAT estas peresperanta klerigado, precipe de la laborista klaso. SAT rigardas Esperanton kiel ilon, ne celon. La organizo havas tendencon ĝenerale socialisman, sed inkluzivas ĉiujn socialismajn frakciojn, kondiĉe ke ili akceptas la principon de libera kaj malferma debato. La vorto "sennacieca" indikas ke la organizo, malsame al la plej granda parto de la internacia laborista movado, havas nur individuajn membrojn. Hejmpaĝo (multlingva): www.satesperanto.org



1.5. Taŭga por internacia komunikado



Eble vi iam dum la legado ĝis nun pensis simile al ĉi tio:

Esperanto, internacia lingvo... Sed, ni jam havas internacian lingvon. La angla estas la internacia lingvo de la mondo kaj preskaŭ ĉiuj parolas ĝin.

Tute prave, la angla estas la plej multe uzata lingvo en internaciaj cirkonstancoj. Ĉirkaŭ 7% de la homaro parolas la anglan denaske kaj laŭ diversaj taksoj ankoraŭ ĉ 7% atingis altan nivelon de la angla lernante ĝin kiel junulo aŭ plenkreskulo. Sed tiuj, kiuj atingas altan nivelon de la angla, ĝenerale estas homoj kies gepatra lingvo iom similas al la angla, ekzemple germanoj, nederlandanoj kaj svedoj. Por multaj aliaj, ekzemple hungaroj, ĉinoj, japanoj, turkoj kaj koreoj, kies gepatra lingvo multe malsimilas de la angla, estas ofte tre malfacile kaj ege temporabe atingi altan nivelon de la angla.

Ankaŭ multaj aliaj lingvoj estas uzataj por translingva komunikado en geografie limigitaj regionoj. Por internacia komunikado ekzistas multaj variantoj kaj ebloj. Ni opinias ke plurlingvismo estas io tre subteninda kaj la Esperanto-movado ankaŭ laboras por subteni la uzon de malgrandaj kaj minoritataj lingvoj en diversaj kontekstoj. Indas tamen memori ke ne ĉiuj facile lernas fremdajn lingvojn kaj ke ne ĉiuj emas uzi sian tempon por lerni plurajn lingvojn. I.a. por homoj kiuj ŝatus povi paroli fremdan lingvon, sed ne sukcesis tion atingi en la lernejo, Esperanto povas esti interesa alternativo.

Laŭ niaj spertoj Esperanto estas tre taŭga por internacia komunikado, i.a. pro la sekvaj kialoj:

1) Pli facila

Por ĉiuj kiuj lernis kaj Esperanton kaj nacian/etnan lingvon, kiel fremdajn lingvojn, estas klare ke Esperanto estas pli facile lernebla ol la naciaj/etnaj lingvoj. Esperanto estas relative facila, ĉar la lingvo havas malmultajn regulojn, kaj ili ne havas esceptojn. Krome necesas lerni malpli da vortoj ol en aliaj lingvoj, ĉar facilas kunmeti vortojn el radikoj kaj prefiksoj (antaŭsilaboj) kaj sufiksoj (postsilaboj). (Ekzemploj troviĝas en la parto 2.4.) Ne eblas ekzakte diri, kiom pli facile lernebla estas Esperanto, ĉar tio dependas interalie de la komparata lingvo kaj de la nivelo. Ĝenerale oni lernas Esperanton en kvinono ĝis triono de la tempo, kiun oni bezonas por sama nivelo en aliaj lingvoj.



MALKOVRU ESPERANTON

2) Pli neŭtrala

Ĉar Esperanto ne apartenas al iu aparta nacio aŭ popolo, ĝi estas pli neŭtrala ol la naciaj/etnaj lingvoj por internacia komunikado. Esperanto ne estas ligita al iu aparta nacia aŭ etna kulturo kio estas granda avantaĝo por lingvo kiu funkcias kiel ponto inter la diversaj popoloj de la mondo. (Esperanto tamen ne estas senkultura lingvo, sed havas sian propran internacian kulturon.)

3) Pli justa

Ĉiuj kiuj lernas Esperanton havas bonan ŝancon atingi altan nivelon de ĝi kaj poste, el lingva vidpunkto, similnivele komuniki kun aliaj, sendepende de lingva fono. Tio validas por ĉiuj popoloj,



ne nur la okcidentaj. Ankaŭ tiuj kiuj parolas Esperanton havis similan eblon atingi en ĝi altan nivelon (denaskuloj ĝenerale ne parolas pli bonan Esperanton ol aliaj kiuj serioze lernis ĝin). Pro tio Esperanto estas pli justa kiel internacia lingvo ol la naciaj lingvoj, kiujn kelkaj sen granda fortostreĉo regas pli bone ol la aliaj, kiuj devis multege peni por atingi altan nivelon de ili.

Laŭ mia opinio, ĉinaj homoj lernas Esperanton multe pli facile ol eŭropajn lingvojn. Eĉ la ĉinoj kiuj jam lernis Esperanton ĝuas grandan avantaĝon kompare al aliaj homoj, kiam ili studas eŭropajn lingvojn.

XIAO Peiliang, Ĉinio



Por ĉiuj kiuj sentas ke facileco, neŭtraleco kaj justeco estas gravaj trajtoj de internacia lingvo, Esperanto povas estas tre interesa.

La angla estas la plej uzata lingvo por internacia komunikado hodiaŭ. Sed, kiu scias, povas esti ke iam en la estonteco pli kaj pli da homoj malkovros kiom taŭga Esperanto estas por internacia komunikado kaj ke la angla kaj Esperanto paralele funkcios kiel grandaj internaciaj lingvoj. Tio multon signifus por ĉiuj milionoj da homoj kiuj tre malfacile atingas altan nivelon de la angla.



Mi estas irana studento, kiu studas en Parizo cele al scienca doktorigo. Dum miaj studoj mi ĉiam uzis la anglan, kaj poste, kiam mi venis Francion, mi eklernis la francan. Mi lernis ankaŭ Esperanton, kaj mi devas konfesi, ke ĝi estas la sola lingvo, krom mia gepatra, en kiu mi sentas min bone, mi sentas min komforte (hejme) en neniu alia fremda lingvo. Mia opinio: Esperanto bone taŭgas por ĉiuj homoj, i.a. la azianoj.

Behrouz Soroushian, Irano

1.6. Kulturo en Esperanto

Ekzistas kantoj, filmoj, poezio, romanoj, noveloj, revuoj, teatro, kabaredoj, kanzonoj, roko, popo, repo ktp en Esperanto. Do, ekzistas kulturo en Esperanto. (La vorto "kulturo" povas signifi multe pli ol la supre menciitajn aferojn, sed ĉi tie ni limigas nin al tio.)

Jam en la unua libreto de Esperanto troviĝis poemoj. Ekde la komenco, homoj rimarkis kiel riĉe kaj bele eblas sin esprimi en Esperanto. Estas ja lingvo, en kiu oni sentas sin libera, i.a. pro la relative libera vortordo kaj la eblo kunmeti novajn vortojn per prefiksoj kaj sufiksoj.

Mi malkovris kiel mirinda estas la lingvo por verki kantotekstojn, kaj mi volis daŭrigi pro la plezuro verki en la lingvo.

Martin Wiese,
kantisto de la Esperanto-bandoj
Persone kaj Martin & la talpoj



Kanti en Esperanto kiel kanti en la portugala kaj pli amuze ol kanti en la angla.

Rogener Pavinski el Brazilo,
kantisto de la rokbando
Supernova



Esperanto ankaŭ funkcias kiel ponto inter naciaj/etnaj kulturoj. Ekzemplo de tio estas la miloj da libroj tradukitaj en Esperanton el naciaj/etnaj lingvoj. Inter ili estas kaj grandaj klasikaj verkoj kaj nekonataj "literaturaj perloj" origine verkitaj en malgrandaj lingvoj.



Abundas revuoj en Esperanto kun diversaj temoj kaj celgrupoj. Du el ili estas *Monato* kaj *Beletra Almanako*:

Monato estas monata revuo pri grandaj kaj malgrandaj okazaĵoj en la mondo. Ĝia specifaĵo estas ke, anstataŭ alilandaj korespondantoj kiuj malofte vere profunde povas ekkoni kaj kompreni la lokan socion, la artikolojn verkas rekte homoj kiuj vivas en la landoj kaj spertas la okazaĵojn kiujn ili priskribas.

Beletra Almanako estas literatura revuo kun rubrikoj pri poezio, prozo fikcia aŭ nefikcia, eseoj, recenzoj, teatro ktp, originale kaj traduke. Ekzistas ankaŭ iom

da filmoj kaj teatraĵoj en Esperanto, ekzemple pluraj el la grandaj verkoj de Shakespeare. Alia ekzemplo estas la verkisto Harold Brown kiu kreis teatraĵojn en Esperanto, el kiuj kelkaj estis tradukitaj al naciaj lingvoj – <http://harold-brown-author-verkisto.webs.com/>.



Ĉiujare aperas multaj novaj libroj verkitaj en Esperanto.

Ĉiujare aperas ankaŭ multaj novaj kantoj en Esperanto kaj eldoniĝas KD-oj de diversstilaj artistoj. En la reto troviĝas Esperanto-radioj kaj podkasto. De tempo al tempo okazas kulturaj festivaloj, dum kiuj eblas ĝui diversajn flankoj de la kulturo en Esperanto.

Se vi ŝatus aŭskulti kantojn en Esperanto, vi povas iri al www.vinilkosmo.com/.



1.7. Gravaj atentigoj

La Esperanto-komunumo tre subtenas la ideojn de lingva diverseco, lingvaj rajtoj ktp. Ĉiuj lingvoj ja estas valoraj kaj gravas ke la grandaj lingvoj ne forpuŝu la lokajn kaj minoritatajn lingvojn.

Lernado de Esperanto bone preparas ne nur infanojn, sed ankaŭ plenkreskulojn, al pli facila kaj rapida lernado de aliaj lingvoj. Krome, tiuj kiuj lernas Esperanton ofte ekhavas emon lerni ankaŭ aliajn lingvojn.

Esperanto ne estas perfekta. Ĝi estas nek perfekte neŭtrala, nek perfekte justa. Tamen ĝi estas, laŭ niaj spertoj, pli neŭtrala kaj pli justa ol la naciaj lingvoj en internacia komunikado.

Esperanto ne estas nacia lingvo, ne havas saman celon aŭ funkcion, ĝia kriterio de boneco do ne estos kiagrade ĝi kapablas fari kion faras naciaj lingvoj, sed kiagrade ĝi plenumas sian funkcion: esti peranto inter gentoj.

El la libro *La Bona Lingvo* de Claude Piron

2. Lingva prezenteto de Esperanto

Ĉi tie ni mallonge prezentas la lingvon Esperanto. Ĉar postulus tro da spaco priskribi la tutan lingvon, ni limigos la prezenton al literoj, vortoj kaj vortfarado. (Por prezento de la tuta gramatiko, kursoj, ekzercoj kaj vortaroj, ni rekomendas la multlingvan paĝaron www.lernu.net.)

2.1. Literoj kaj prononcado

Esperanto havas 28 literojn, el kiuj 5 estas vokaloj:
a b c ĉ d e f g ĝ h ĥ i j k l m n o p r s ŝ t u ŭ v z

Granda avantaĝo estas ke ĉiu litero prononciĝas pli-malpli same en ĉiuj vortoj, kaj ke oni literumas vortojn same kiel oni prononcas ilin. Do, se oni scias kiel prononci vorton, oni ankaŭ scias kiel literumi ĝin. La akcento ĉiam estas sur la antaŭlasta silabo, ekzemple: hUndo, internaĉla, flOro, famillo

2.2. Vortoj

La vortradikoj en Esperanto devenas de diversaj lingvoj, ĉirkaŭ 75% el la latinidaj lingvoj, ĉ 20% el la ĝermanaj kaj ĉ 5% el aliaj lingvoj. Zamenhof provis elekti vortradikojn kiuj jam estas konataj en la grandaj eŭropaj lingvoj. Jen kelkaj ekzemploj:

- ◆ el la latina: *sed, tamen, okulo, akvo*
- ◆ el la franca: *dimanĉo, fermi, ĉevalo, butikoj*
- ◆ el la itala: *ĉielo, fari, voĉo*
- ◆ el pluraj latinidaj: *facila, fero, tra, verda*
- ◆ el la germana: *baldaŭ, bedaŭri, jaro, nur*
- ◆ el la angla: *birdo, suno, ŝarko, teamo*
- ◆ el pluraj ĝermanaj: *bildo, fremda, halti, ofta*

En Esperanto multaj vortoj ne ekzistas kiel radikoj, sed kiel kunmetaĵoj. Ekzemple ne ekzistas radiko por la vorto "tranĉilo", sed oni uzas la radikon *tranĉ-* kun la sufikso *-il-* kiu indikas ilon, kaj la finaĵon *-o* kiu indikas substantivon kaj kunmetas tion al tranĉilo. Aliaj ekzemploj kun la sufikso *-il-* estas: *tondilo, ŝraŭbilo, skribilo, retumilo, ludilo*.



2.3. Vortfinaĵoj

Interesa afero en Esperanto estas ke ekzistas difinitaj vortfinaĵoj kiuj aplikeblas je ĉiu vortradiko.

Ekzemple, se ni prenas la radikon *somer-* kaj al ĝi aldonas la finaĵon *o* (kiu indikas substantivon) ni ricevas *somero*, sed se ni aldonas *a*, kiu indikas adjektivon, la vorto iĝas *somera* kaj aldonado de *e*, kiu indikas adverbon, donas la vorton *somere*. La finaĵo *j* estas uzata por montri pluralon: *someroj*.

En Italio estas varmaj someroj.
Somere mi ŝatas bicikli.
Kia bela somera robo.

-o por substantivoj

Substantivo estas nomo de aĵo aŭ afero. Substantivo respondas al la demando "Kio ĝi (ŝi, li) estas?". Ekz: *homo, ideo, nomo, domo*.

-a por adjektivoj

Adjektivo priskribas substantivon. Adjektivo respondas al la demando "Kia ĝi (ŝi, li) estas?" Ekz: *bela, bona, longa, varma, interesa*.

-e por adverboj

Adverboj priskribas verbon, adjektivon, alian adverbon aŭ tutan frazon. Ekz: *bele, longe, bone, interese*.

(Ekzistas ankaŭ kelkaj adverboj kiuj ne finiĝas per *-e*, la tiel nomataj primitivaj adverboj.)

-j por pluralo

Pluralo signas ke temas pri pli ol unu afero. Ekz: *homoj, ideoj, grandaj domoj, varmaj someroj*.

-n por objekto

Objekto estas tio kio estas rekte trafata de la ago en la frazo. Ekzemple en la frazo *Ŝi amas lin*, *lin* estas la objekto.

-i, -is, -as, -os, -us, -u por verboj

La finaĵoj kiuj rilatas al verboj estas:

- ◆ **-i** por la bazformo
 - ▣ ekz: *vidi, kanti, ridi*
- ◆ **-is** por estinta tempo
 - ▣ ekz: *vidis, kantis, ridis*
- ◆ **-as** por estanta tempo
 - ▣ ekz: *vidas, kantas, ridas*
- ◆ **-os** por estonta tempo
 - ▣ ekz: *vidos, kantos, ridos*
- ◆ **-us** por kondiĉformo
 - ▣ ekz: *vidus, kantus, ridus*
- ◆ **-u** por admonoj
 - ▣ ekz: *vidu, kantu, ridu*

Tiuj verbfinaĵoj validas por ĉiuj verboj kaj sekve ne ekzistas neregulaj verboj en Esperanto. Agrable, ĉu ne?!



en Esperanto (kiujn la Esperanto-lernanto jam konas) estas relative facila tasko lerni la novajn vortojn en tiu lingvo, sed por la lernanto de la angla estas iom pli malfacile... Vidu:

<u>Esperante</u>	<u>Angle</u>	<u>[vialingve]</u>
manĝi	to eat
manĝas	eats
manĝis	ate
manĝos	will eat
manĝo	a meal
manĝaĵo	food
manĝado	eating
manĝejo	dining hall/room
manĝujo	container for food
manĝiloj	silverware
manĝebla	edible
manĝinda	worth eating
manĝeti	to snack
manĝegi	to feast
manĝaĉi	to eat badly
manĝema	interested in eating
manĝanto	eater, diner

2.4. Vortfarado

Unu sama vortradiko povas en Esperanto doni plurajn vortojn en kombino kun diversaj antaŭsilaboj (prefiksoj), postsilaboj (sufiksoj) kaj finaĵoj. Tio signifas ke oni ne bezonas lerni same multe da vortoj kiel en aliaj lingvoj, ĉar oni facile kreas ilin uzante prefiksojn kaj afiksojn.

Unu eblo estas uzi la diversajn finaĵojn:

interes' =>
 intereso
 interesoj
 interesa
 interese
 interesi

Per diversaj prefiksoj (antaŭsilaboj) kaj sufiksoj (postsilaboj) oni povas krei pli da vortoj de la sama radiko. Ekzistas 10 prefiksoj kaj 32 sufiksoj en Esperanto, jen kelkaj ekzemploj:

- ◆ **mal-** indikas malan signifon:
 ➡ bona – malbona, juna – maljuna,
 fermi – malfermi
- ◆ **-ej-** indikas lokon:
 ➡ lerni – lernejo, loĝi – loĝejo, vendi – vendejo
- ◆ **-in-** indikas inan formon:
 ➡ knabo – knabino, frato – fratino, viro – virino
- ◆ **-ul-** indikas personon: juna – junulo,
 grava – gravulo, stulta – stultulo

La afiksa sistemo de Esperanto estas unu el la plej grandaj elpensadoj de Zamenhof.

John Wells,
 profesoro pri fonetiko

En sia libro *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* profesoro Wells faras pensigan komparon inter lernado de la angla kaj Esperanto. En la komparado li supozas ke du lernantoj, kiuj jam scias la bazon de la angla respektive Esperanto, lernu la vorton "manĝi" kun rilataj vortoj. Pro la prefiksoj kaj sufiksoj

La lernanto de Esperanto pli-malpli tuj scias la vortojn en la supra ekzemplo ĉar ili estas kunmetaĵoj de la radiko manĝ-, vortfinaĵoj kaj diversaj prefiksoj kaj sufiksoj kiujn la lernanto jam konas. Sed la lernanto de la angla devas sufiĉe multe ŝviti antaŭ ol li aŭ ŝi memoras ĉiujn tiujn vortojn, lernas kiel prononci kaj literumi ilin. Similan ekzemplon ni povus fari pri preskaŭ ĉiu baza vorto bezonata por povi interkompreniĝi en internacia komunikado. Do, eble vi nun pli bone imagas kial estas pluroble pli facile lerni Esperanton ol ekz la anglan kiel fremdan lingvon...

2.5. Kelkaj frazoj en Esperanto

Saluton!
 Bonan tagon!
 Kiel vi nomiĝas?
 Mia nomo estas ...
 Kiel vi fartas?
 Mi fartas bone.
 Kie vi loĝas?
 Mi loĝas en ...
 Mi ĝojas renkonti vin.
 Ankaŭ mi!
 Bonege!

Se vi ŝatus aŭskulti parolatan Esperanton ni rekomendas al vi la retpaĝon Radio Verda – www.radioverda.com, aŭ la elsendojn de Radio Polonia en Esperanto: www.polskieradio.pl/eo/.



La riĉe ilustrita lernolibro *Esperanto per rekta metodo* de Stano Marček aperis en multaj lingvoj.
 Informoj ĉe: www.stano.marcek.ipernity.com

3. Personaj rakontetoj pri Esperanto

Jen sekvas kelkaj personaj rakontetoj de homoj kiuj multe uzas Esperanton.

MI SENTAS MIN PARTO DE TUTMONDA KOMUNUMO

JAM DE 7 JAROJ ESPERANTO ESTAS MIA ĈEFA OKUPO



Nomo: Erin Piatieski

Lando: Usono

Profesio: Meĥanika inĝeniero

En la Esperanto-movado i.a.:

- ◆ Teamano de lernu.net



Nomo: Katalin Kovats

Lando: Nederlando / Hungario

Profesio: Instruisto kaj redaktoro de ttt-paĝaroj

En la Esperanto-movado interalie:

- ◆ Iniciatinto kaj redaktoro de www.edukado.net
- ◆ Tre ŝatata instruisto kaj pedagogo

Mi eklernis Esperanton en la gimnazio, ĉar mi aŭdis ke Esperanto estas facila lingvo, kaj mi supozis pro tio ke Esperanto estis mia nura ŝanco por paroli fremdan lingvon flue. Mi trovis ke miaj amikoj kaj familianoj kiuj studis iun lingvon en kurso preskaŭ neniam povis paroli tiun lingvon, eĉ je baza nivelo. Do mi studis Esperanton, esperante ke ĝi estus mia enkonduko al la mondo de fremdaj lingvoj. Mi tiam ne imagis, kion mi poste povus fari per la lingvo; mi simple volis lerni fremdan lingvon, por povi diri ke mi parolas pli ol unu lingvon.

Malgraŭ tiu simpla plano, Esperanto fariĝis grava parto de mia vivo. Mi nun havas koramikojn el Italio, kun kiu mi parolas nur Esperanton. En tiu senco, paroli Esperanton fariĝis tre kutima afero por mi; mi uzas ĝin ne nur por paroli kun homoj en aliaj landoj, sed ankaŭ por paroli pri la vetero, por debati pri lastatempa politiko, kaj por demandi ĉu estas en la fridujo sufiĉe multaj ovoĵoj por kuiri patkukojn. Sed Esperanto ne nur donis al mi amrilaton; ĝi ankaŭ ŝanĝis la manieron en kiu mi vidas la mondon. Multaj diras ke oni povas paroli kun homoj de ĉiuj landoj en la mondo per la angla, kaj tio veras. Sed malmultaj scias ke tio veras ankaŭ por Esperanto. Mi trovis ke estas grandaj diferencoj inter uzo de la angla, kaj de Esperanto, por internacia komunikado. Mi sentas ke uzo de Esperanto egaligas la parolantojn, ne nur el lingva vidpunkto, sed ankaŭ el socia vidpunkto.

Per Esperanto, mi sentas ke mi havas "nekonatajn amikojn" preskaŭ ĉie en la mondo. Kiam mi vojaĝas, ĉu por mia laboro aŭ ĉu por ferio, mi preskaŭ ĉiam povas trovi lokan esperantiston, kun kiu mi povos renkontiĝi. En lando kiun mi neniam antaŭe vizitis, tio signifas ke jam post unu vespero, mi ne plu sentas min fremda en la nova lando. Mi povas facile paroli kun la aliaj per komuna lingvo; mi ne devas zorgi ĉu mi povas legi la menuon ĉe restoracio, aŭ ĉu mi komprenas la lokajn kutimojn, ĉar la lokaj esperantistoj helpas min pri tio. Sekve mi sentas min parto de tutmonda komunumo; ne kiel usonano, sed kiel esperantisto.

Atendante mian unuan infanon kaj kuŝante en hospitalo dum longaj monatoj, en la lastaj semajnoj mi subite ekpensis pri Esperanto, pri kio mi aŭdis jam plurfoje en mia vivo, kaj petis mian edzon akiri al mi lernolibron kaj vortaron. *30 nap alatt eszperantóul* (Ene de 30 tagoj en Esperanto) estis la titolo de la libro, kiun mi intense studis antaŭ ol mia unua filo naskiĝis. Estis granda ĝuo en mia tiama "senkapableco" alproprigi lingvon je komunikkapabla nivelo ene de kelkaj semajnoj!

Mi plulernis ankaŭ post la nasko kaj baldaŭ mi mem ekinstruis Esperanton en la lernejo, kie mi instruis matematikon kaj la rusan lingvon. Poste mi serĉis kontaktojn kun esperantistoj. Tio en Hungario ne estis malfacila tasko, ja abundis kaj abundas ankaŭ nun diplomitaj instruistoj pri Esperanto. Ankaŭ mi fariĝis tio kaj la "verda lingvo" (t.e. Esperanto) komencis trateksi nian vivon. Mian kaj tiun de la tuta familio. Pere de ĝi ni ekhavis eblojn vojaĝi, mi staĝis en Esperanto-centro en Svislando kaj instruis en Francio, poste unu post la aliaj mi gvidis kursojn en dekoj da landoj de Eŭropo. Kelkfoje mi havis okazon instrui ankaŭ en Usono, Aŭstralio kaj en Afriko. Miaj gefiloj – male al siaj samklasanoj – ekhavis amikojn el multaj landoj, kio signife larĝigis iliajn mondkoncepton kaj malfermitecon al diversaj kulturoj kaj lingvoj.



MIA ĈEFA INTERESO EN ESPERANTO ESTAS ĜIA KULTURA FLANKO

Nomo: Rogener Pavinski

Lando: Brazilo

Profesio: Filmisto kaj muzikisto

En la Esperanto-movado

interalie: ♦ Muzikisto

en la rokgrupo Supernova

♦ Ĉefkreato de la filmo

Esperanto estas...

♦ TEJO-estrarano



En 2005 mi partoprenis konkurson de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kaj ricevis subvencion por vojaĝi al IJK en Pollando. Mi profitis tiun ŝancon kaj pasigis unu monaton en kvar Esperanto-aranĝoj en 4 malsamaj landoj. Tio estis neforgesebla aventuro por mi, kiu unufoje vojaĝis eksterlanden!

Mia ĉefa intereso en Esperanto estas ĝia kultura flanko kaj mi ĉiam volis krei muzikon en Esperanto, do mi kun amikoj komencis prilabori kanzonojn kaj la rezulto estis starigo de roka grupo kaj disko nomata Supernova, lanĉita en 2006 per la diskeldonejo Vinilkosmo en Francio. Mi ankaŭ profesie okupiĝas pri Esperanto. Unu el la plej gravaj projektoj, kiujn mi partoprenis ĝis nun estis la internacia kunlaboro pri la informfilmo *Esperanto estas...*, kies muntadon mi faris. Ankaŭ muzikvideon por Supernova kaj aliajn plurspecajn filmetojn mi kreis kaj kreas.

ESPERANTO IGIS MIN MONDCIVITANO



Nomo: Jean Codjo

Lando: Kanado / Benino

Profesio: Instruisto

En la Esperanto-movado i.a.:

♦ Membro de Afrika komisiono

♦ Redaktoro de la bulteno *Esperanto en Afriko*

Eesperanton mi tuthazarde eklernis dum politika kriza epoko en Benino (1988). Tiam mi intencis lerni la hispanan lingvon kaj konfuze mi konsideris Esperanton kiel la hispanan. Mi ekdubis, kiam mi rimarkis ke la lingvo estas tro facila por esti la hispana. Nur post tiu dubo, mi konsciis, ke fakte temis pri iu internacia lingvo. Unue mi memlernis Esperanton dum kelkaj semajnoj kaj poste perkoresponde mi daŭrigis kun la helpo de esperantisto en Nederlando.

Por mi, Esperanto iĝis plia lingvo per kiu mi povas komuniki kun novaj amikoj en diversaj landoj, ankaŭ kun hispanoj. Tiel mi konatiĝis kun homoj el ĉiuj partoj de la terglobo, eĉ kun homoj, pri kies gepatra lingvo mi antaŭe tute sciis nenion. Krome, Esperanto influis al mia privata kaj profesia vivo, al mia sinteno, al mia pensmaniero kaj al mia rilato kun aliaj homoj, egale al kiuj etnoj aŭ kulturoj ili apartenas.

Mi poste lernis la germanan lingvon danke al Esperanto. Mia tutunua korespondantino estis germanino. Kvankam ni korespondis esperante, mia emo sciis pri ŝia lingvo iĝis granda. Mi ankaŭ sciis, ke kelkaj eroj koncerne la gramatikaĵojn, precipe la akuzativo, similas al tiuj de la germana lingvo. Kunmetado de vortoj por krei alian vorton ankaŭ similas al vortkreado en la germana. Finfine mi decidis lerni la germanan ĝis akiro de universitata diplomo. Hodiaŭ mi profesie instruas lingvojn, interalie la germanan lingvon. Pli tolerema kaj malferma mi iĝis pri aliaj kulturoj. Pro Esperanto, mi sentas min vera mondcivitano.

DANK' AL ESPERANTO MI OFTE ĜUIS INTIMAN KONTAKTON EKSTERLANDE



Nomo: Satoo Reiko

Lando: Japanio

Post la fino de la dua mondmilito mia pliaĝa frato eklernis latinajn literojn. Gvidante la lernadon, mia patrino parolis al la frato kaj mi pri Esperanto, kiun ŝi lernis en sia juneco. Ŝiaj vortoj ial restis en mia koro longan tempon kun granda impresio. Post ĉirkaŭ 42 jaroj mi legis artikolon pri Esperanto en iu ĵurnalo. Ĝi forte interesis min kun la sopiro al mia patrino kaj instigis min al partopreno en la kurso, kiu tiam okazis en la civitana halo. Mi kuraĝe vizitis la ĉambiron de la kurso, kaj eklernis Esperanton en ĉiu merkredo de majo ĝis oktobro krom aŭgusto. Tuj post la fino de la kurso mi komencis korespondi kun bulgara virino kaj ĝuis tion kun granda ĝojo. Post ne longe neatendite mi ricevis leteron de ĉeĥa virino, kiu deziris korespondi. En 1995 kiam mi vojaĝis en Orienta Eŭropo kun mia edzo, en Prago mi renkontiĝis kun ŝi kaj ŝia edzo. Tio estis granda kortuŝo neesprimebla en vortoj. Dank' al Esperanto kaj esperantistoj mi ofte ĝuis agrablan vojaĝon kaj intimajn interfluojn eksterlande.

LERNADO DE ESPERANTO KONDUKIS MIN AL NOVA MONDOPARTO

Nomo: Russ Williams

Lando: Polujo / Usono

Profesioj: Tradukisto kaj instruisto

En la Esperanto-movado interalie:

- ◆ Aktivulo en lernu.net kaj aliaj projektoj
- ◆ Diversaj tradukaj projektoj



En aprilo de 2003, kelkaj kolegoj kaj mi impulse decidis lerni planlingvon por amuzi nin. Post kelkaj interesaj tagoj kun la planlingvo Lojban, du el ni pensis: "Nu, Lojban ŝajnas tre malfacila lingvo, kaj verŝajne malmultegaj homoj efektive parolas ĝin. Eble ni rigardu Esperanton. Supozeble ĝi pli facilas kaj havas pli multajn parolantojn." Iom da google-serĉado pruvis tion, kaj instigis min legi pri la interesaj historio, kulturo kaj literaturo de Esperanto. Mi konstatis ke Esperanto ekallogis min ne nur kiel gramatike eleganta amuzaĵo. Politikaj eventoj en 2003 pensigis min pri paco, toleremo, pli bona interkompreno, internaciaj rilatoj, ktp. Mi havis intuicion, ke lerni Esperanton estos grava decido en mia vivo, sed mi tute ne imagis ke mi loĝos en alia mondoparto pro Esperanto.

Por resumi longan rakonton, mi inter 2003 kaj 2005 partoprenis en diversaj Esperanto-renkontiĝoj ĉirkaŭ la mondo, konatiĝis kun tre ĉarma polino, translokiĝis al Vroclavo, Polujo, kaj nun Anna kaj mi loĝas kune gefianĉe, uzante Esperanton ĉiutage kiel nian ĉefan hejmlingvon. Mi lernas la polan, kiu ege pli malfacilas ol Esperanto, sed mia kono de Esperanto kiel dua lingvo helpas lerni aliajn lingvojn kaj donas memfidon pri lingvolernado. Mi feliĉas, ke iun tagon en 2003 kelkaj kolegoj kaj mi ekbabilis duonŝerce pri planlingvoj!

ESPERANTO ALPORTAS AL MI INTERNACIAN AMIKECON



Nomo: LI JIANHUA

Lando: Ĉinio

Profesio: Ĵurnalisto

En la Esperanto-movado interalie:

- ◆ Laboras por la revuo *El popola Ĉinio*

Mi eklernis Esperanton en la Ĉina Komunika Universitato en aŭtuno, 2003. Jaron poste mi laboris kiel volontulo kaj ĉiĉerono dum la 89a Universala Kongreso en Pekino. Diplomiĝinte el la universitato, mi eklaboris en la redakcio de *El Popola Ĉinio* en julio 2005. Dum la laboro mi ofte komunikiĝis kun alilandaj Esperanto-parolantoj. Tiu komunikiĝo alportas al mi internacian amikecon. Unu el la amikoj estas Povilas Jegorovas el Litovio kaj li invitis min prelegi dum la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en Vilno, la ĉefurbo de Litovio. Mi tre ĝojis, ĉar tiel mi spertis mian unuan vojaĝon eksterlanden kaj faris mian unuan prelegon en tia kongreso. Dank' al subvencio de la redakcio de *El Popola Ĉinio*, mi povis ĉeesti la kongreson. Tio kreis ankaŭ du "unuafaje" de mia vivo: unuafaje mi tie interparolis kun alilandaj altranguloj (prezidanto de la litova parlamento kaj urbestro de Vilno ĉeestis la bankedon, kaj mi interparolis kun ili helpate de sinjoro Jegorovas) kaj unuafaje mi ĉeestis faradon de TV-programo. Mi rikoltis multajn amikojn kaj profundan amikecon en tiu ĉi kongreso, tion mi neniam forgesos.

MI ESTIS RAVITA DE LA INTERNA LOGIKO DE ESPERANTO

Nomo: Zsófia Kóródy

Lando: Germanio / Hungario

Profesio: Diplomita Esperanto-instruisto

En la Esperanto-movado i.a.:

- ◆ Estrarano de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
- ◆ Estro de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj



Mi studis lingvistikon en universitato en Budapeŝto kaj komencis lerni Esperanton nur pro tio, ke mi vidu, kion enhavas, kiel funkcias iu kreita, t.n. planlingvo. Mi estis ravita de la strukturo, la interna logiko de Esperanto. Sed simpla analizado de la lingvo ne kontentigis min kaj mi serĉis la parolantojn, la uzeblon de tiu lingvo. Nova mondo malfermis sin: mi ekkonis multajn homojn, geamikojn en la tuta mondo kaj per ili konatiĝis kun fremdaj landoj, urboj, kulturoj kaj kutimoj. Poste mi decidis fariĝi Esperanto-instruisto kaj dediĉi mian vivon al tio, ke per mia laboro pli kaj pli da homoj ekkonu tiun mirindan interhoman komunikilon.

Mi instruas diversajn lingvojn kaj ankaŭ Esperanton de pli ol 30 jaroj kaj en lernejoj kaj en diversaj kursoj. Estas tre interese kompari la rezultojn de miaj gekursanoj kaj vidi, kiom pli rapide ili ekuzas Esperanton kaj jam post mallonga tempo ili povas konversacii en tiu lingvo kaj facile trovas geamikojn el diversaj landoj. De 2003 mi vivas kaj laboras en la germana urbo Herzberg am Harz, kie ankaŭ mia instrulaboro kontribuis al tio, ke

Esperanto fariĝis elektebla instrufako en la lernejoj kaj ke Esperanto fariĝis komunikad-lingvo por ĝemelurbaj kontaktoj. Pro la plurkampa ĉeesto kaj uzado de Esperanto en la urbo, la urba konsilantaro en 2006 aldonis la kromnomon: "Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo".

ESPERANTO ESTAS PARTO DE MIA NORMALA VIVO

Nomo: Renato Corsetti

Lando: Italujo

Profesio: Profesoro pri psiĥolingvistiko, emerita

En la Esperanto-movado interalie:

- ◆ Eksa prezidanto de TEJO kaj de UEA
- ◆ Membro de la Akademio de Esperanto



Mi lernis Esperanton kiam mi estis relative juna, ĉirkaŭ dudek-jara, pro interesiĝo pri lingvoj. Mi mem en tiu periodo lernis la svahilan aŭ la urduan simple pro la plezuro lerni pliajn lingvojn. Esperanton mi ellernis mem el lernolibro, kiun mi trovis ie. La ceterajn lingvojn mi nur iom lernetis kaj ĉefe komprenis kiel ili funkcias. Sed mi ne restis esperantisto pro la lingvo kaj ĝiaj mirindaj lingvaj ecoj. Mi restis esperantisto pro la politika signifo de Esperanto. Ĉiuj homoj kaj popoloj estas egalaj, ĉiuj kulturoj havas en si ion valoran, kaj se vi serĉas vere internacian lingvon, jen estas Esperanto.

Poste aldoniĝis aliaj elementoj al mia esperantista vivo, ĉar mi edziĝis al angla esperantistino kaj ni daŭre parolas Esperanton hejme. Ni havas du filojn, jam tute plenkreskajn, kiuj parolas Esperanton aldone al la itala kaj al la angla. Do, Esperanto estas parto de mia normala vivo, kiam ni iras aĉeti ĉe la loka supervendejo aŭ kiam ni kuiras aŭ amuziĝas. Mi volas nur ankoraŭ diri, kial mi parolas Esperanton daŭre kun mia edzino, malgraŭ tio, ke ŝi dum tridek jaroj lernis la italan tute bone, kaj ke mi en la sama periodo daŭre uzis ankaŭ la anglan por specifaj celoj. Ni parolas Esperanton inter ni, simple ĉar tio sentiĝas plej nature kaj bone por ni.

ESPERANTO MULTE FORTIGIS MIAN INTERESON PRI ALIAJ LANDOJ KAJ KULTUROJ

Nomo: Marcos Cramer

Lando: Germanujo

Profesio: Doktoriganto pri logiko

En la Esperanto-movado interalie:

- ◆ Redaktisto de gazeto pri la junulara Esperanto-movado
- ◆ Kontribuanto al la Esperanta Vikipedio



Dek-ses-jara mi komencis lerni Esperanton pro intereso pri la gramatiko de facila planlingvo. Tuj post la eklernado mi ekinteresiĝis ankaŭ pri la idealoj de Esperanto, nome la internacieco kaj la egaleco, kiuj estis gravaj faktoroj por la plulernado. Komence mi lernis Esperanton el lernolibreto, poste praktikis ĝin en Interreto, kaj jam post naŭ monatoj unuafoje partoprenis tutsemajnan internacian junularan Esperanto-renkontiĝon, kie mi povis bone praktiki la paroladon.

Mi nun uzas Esperanton preskaŭ ĉiutage en Interreto, kie mi havas kontakton kun homoj el diversaj kontinentoj. Aldone, mi ofte partoprenas en internaciaj junularaj aranĝoj kiuj uzas Esperanton, kaj kelkfoje mi uzas la gastigan servon Pasporta Servo por vojaĝi malmultkoste kaj kun pli rekta kontakto al la loka loĝantaro. Esperanto multe fortigis mian intereson pri aliaj landoj kaj kulturoj, kaj ankaŭ mian intereson pri aliaj lingvoj. Per ĝi mi ekkonis mian duone rusan edzinon kaj multajn bonajn amikojn el diversaj landoj.

ESPERANTO MALFERMIS AL MI NOVAN RIGARDON

Nomo: Trinh Hong Hanh

Lando: Vietnamio

Profesio: Komerca oficistino

En la Esperanto-movado interalie:

- ◆ Estrarano de Vietnamia Esperanta Junulara Organizo



Iun tagon en la hejmo de mia intima amikino mi irenkontis ŝian najbarinon, de kiu mi unuafoje informiĝis pri Esperanto, kaj tuj en mia kapo ekĝermis multaj demandoj: *Kia estas la Esperanto-lingvo?*, *Kies estas tiu lingvo?*, *Ĉu ĝi similas al la angla?*, *Ĉu ĝi estas vere facile lernebla?* ktp. Por mem trovi la respondojn al tiuj demandoj, mi decidis lerni Esperanton en la porkomencanta Esperanto-kurso en Hanojo. La kurso estis gvidata kaj instruata de kompetenta pedagogo. Krom la lingvo-instruado, li transdonis al mi ankaŭ internan ideon de Esperanto kaj riĉe praktikajn spertojn en agad-organizado de la movado. Li mem kondukis kaj instigis nin servi por la dua Azia Kongreso de Esperanto aŭguste 1999 en Hanojo.

Kia surprizo! Nur 6 monatojn, ĉiusemajne 3-foje, ni lernis kaj ni faris ĉion necesan kaj eblan por sukcesigi la 2an Azian Kongreson de Esperanto. Kaj kiel vere superbela! La tuto da tiamaj porkomencantaj gekursanoj iĝis la kerno de nia juna Esperanto-movado. Multaj ne nur kontribuis sed ankaŭ prenis sur sin ĉefan repondecon por novfonditaj Esperanto-organizoj. Esperanto malfermis kaj alportis al mi novajn rigardon kaj rekonadon. Mia amo al Esperanto kaj al la movado senhalte grandiĝas. Mi estas vere feliĉa pri mia progreso, des pli, pri la progreso de nia juna Esperanto-movado en Vietnamio.

ESPERANTO TROVIĜAS ANKAŬ EN VILAĜOJ SEN ELEKTRO



Nomo: Vladka Chvátalová

Lando: Ĉeĥio (ekde 2004 laboras en Belgio)

Profesio: tradukistino

En la Esperanto-movado interalie:

◆ eksa ĝenerala sekretariino de TEJO

Mi eklernis Esperanton kiel 13-jara knabino per lernolibro trovita ĉe mia avino. Tiutempe Ĉeĥoslovakio estis sufiĉe fermita lando, el kiu ne eblis simple vojaĝi, kaj mi volis almenaŭ korespondi kun eksterlandanoj, kompreneble prefere el ekzotaj landoj. Post koresponda Esperanto-kurso mi eksciis, ke ekzistas organizita movado ĉirkaŭ la lingvo, kaj mi rapide iĝis membro de la Ĉeĥa Esperanto Junularo. Tiel komenciĝis mia plurjara "vojaĝo" tra "Esperanto-lando" dum kiu mi renkontis reprezentantojn de diversaj kulturoj, ideologioj kaj opinioj – kiom bona lernejo de vivo!

Danke al la ILEI-konferenco okazinta en 2008 en Benino (Afriko) malfermiĝis por mi tute nova mondo, kiun mi nun provas pli bone kompreni kaj kie mi ŝatus per novaj projektoj engaĝiĝi por helpi almenaŭ al kelkaj, kiuj tion tre bezonas. Estas nekredeble, kiom da ege bonaj kaj entuziasmaj Esperanto-parolantoj oni povas trovi en vilaĝoj sen elektro, ekzemple en la sudtogolanda Klévé!

Ni esperanto-parolantoj estas reto de homoj, relative bone organizita, per kiu ni povus ŝanĝi la vivon de (kelkaj) aliaj, inter alie per subteno de lernado kaj bona sanstato de infanoj en malriĉaj landoj. Tion mi ekde 2008 provas fari kunlaborante kun benina orfejo en la urbo Lokossa, en kiu ankaŭ loĝas multaj esperantistoj. Ne ekzistas pli bona rekompenco ol rideto de infano, kiu povis esti rapide kuracita aŭ ricevi lernejan edukon danke al nia helpo.

ESPERANTO MULTE FACILIGAS INTERNACIAJN INTERŜANĜOJN

Nomo: Kong Kil-yoon

Lando: Koreio



Estis hazarda kontakto al mi kun Esperanto. En vintro mi estis spektanta iun programon el televidilo, en kiu iu maljunulo estis lernanta Esperanton en kurso. La vortoj "Esperanto, internacia lingvo" interesis min. Tamen mi tuj forgesis la vortojn. Je la unua tago de ekstudo en universitato, mi refoje trovis la vorton Esperanto sur afiŝo, kiun la membroj de Esperanto-klubo en la universitato aperigis por allogi novajn studentojn. Do, mi partoprenis en ilia kurso.

Kompreninte ĝian gramatikon, mi ekkorespondis kun alilandaj esperantistoj. Por altiĝi mian kapablon de Esperanto mi petis japanan esperantiston korekti miajn erarojn en miaj leteroj. Ŝi helpis min ne nur altiĝi lingve sed ankaŭ kompreni esperantismon. Ĝis nun mi povis amikiĝi kun centoj da esperantistoj en la mondo pere de Esperanto. Daŭre korespondante kaj interparolante kun ili, mi ekkomprenas la celon de Esperanto. Internaciaj kontaktoj kaj interŝanĝoj estas vere interesaj kaj Esperanto multe faciligas tion.

POR MI ESPERANTO ESTAS INSPIRO

Nomo: Hokan Lundberg

Lando: Svedio

Profesio: Gimnazia instruisto

En la Esperanto-movado i.a.:

◆ Unu el la fondintoj de E@I kaj lernu.net

◆ Kunordiganto de tiu ĉi broŝuro



En la lernejo mi havis problemon lerni fremdajn lingvojn. Mi luktis pri la angla kaj la germana dum multaj jaroj, sed bedaŭrinde neniam atingis bonan rezulton. Kiam mi estis 20-jara mi ekhavis emon lerni Esperanton pro influo de la dana verkisto Martinus. Ankaŭ pri Esperanto mi devis lukti dum pluraj jaroj, sed la diferenco estis ke mi sentis ke mi povos iam regi tiun lingvon kaj iom post iom mi atingis altan nivelon. Do, eblas diri ke mi estas pruvo pri tio ke persono sen talento lerni fremdan lingvon povas bone lerni Esperanton. Tiuj spertoj inspiris min labori por la lingvo en pluraj manieroj.

Dum kelkaj jaroj mi plentempe okupiĝis pri Esperanto-projektoj, sed nuntempe nur en mia libertempo. Ankaŭ mia edzino, Sonja, tre ŝatas Esperanton. Ni renkontiĝis dum TEJO-seminario ĉe la Nigra maro en Bulgario kaj ekde tiam uzas Esperanton inter ni. Sonja estas el Serbio kaj mi el Svedio, do Esperanto funkcias kiel lingva ponto inter niaj malsamaj fonoj. Ŝi parolas la serban kun niaj infanoj kaj mi Esperanton. En la infanejo kaj la ĉirkaŭaĵo ili uzas la svedan. Tio funkcias tre bone. Estas mirinde vidi kiel infano povas rapide ŝanĝi inter malsamaj lingvoj depende de tio kun kiu ĝi parolas.

Ni decidis ke mi uzu Esperanton kun niaj infanoj pro ĉefe du kialoj: 1) Por eviti ke ilia sveda iĝu tro domina kompare kun ilia serba, tiel ke ili ne nur komprenu la serban sed ankaŭ uzu ĝin aktive kiam ni vizitas geavojn kaj amikojn en Serbio. 2) Ĉar mi kaj mia edzino volas pluuzi Esperanton inter ni kaj do havi ĝin kiel unu el niaj familiaj lingvoj. Ankoraŭ unu kialo estas ke mi tre ŝatas uzi Esperanton, aparte kun miaj amoj.

Kiel vi rimarkis en la supraj rakontetoj, pluraj homoj trovas sian vivpartneron per Esperanto. Ĉu ne bona indiko je tio ke en Esperanto eblas esprimi ankaŭ sentojn kaj amon?

4. Zamenhof, iniciatinto de Esperanto

Kiel infano Zamenhof havis plurajn revojn pri kiel unuigi kaj pacigi la homaron. Iniciati internacian lingvon estis unu el ili, kaj tiun revon li neniam forlasis. En tiu ĉi parto vi ekscios de kie venis lia ideo pri nova internacia lingvo kaj kiel li realigis ĝin.

4.1. Knabo kun granda revo

En la jaro 1859 naskiĝis juda knabo kiu ricevis la nomon Ludwik Lejzer Zamenhof. Li elkreskis en la malgranda urbo Bjalistoko kie loĝis poloj, rusoj, judoj, germanoj kaj iom da litovoj, ĉiuj kun siaj lingvo. Zamenhof frue rimarkis ke tiuj homgrupoj ne ĉiam bone kongruis kaj ke la miskomprenoj kaj kvereloj inter ili ofte fontis el la manko de komuna lingvo. Tiuj spertoj forte influis la junan Ludovikon (esperanta formo de Ludwik) kaj jam kiel infano li ekhavis grandan revon pri komuna lingvo (aldone al ĉiuj etnaj lingvoj) inter la diversaj popolgrupoj. Kun komuna lingvo lokoj kiel Bjalistoko iĝus pli trankvilaj kaj homoj havus ŝancon rekte interparoli por provi solvi eventualan konflikton antaŭ ol ĝi iĝus vera kverelo.



Se mi ne estus hebreo el la geto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo.

Zamenhof skribis en letero en la jaro 1905

4.2. Ĉu per klasika lingvo?

Zamenhof estis konvinkita ke ne bonus se la komuna lingvo inter la diversaj etnoj apartenus al unu el ili. Tio povus krei ĵaluzon ĉe la aliaj etnoj kaj doni grandajn avantaĝojn al homoj por kiuj tiu lingvo estus la gepatra. En la gimnazio Zamenhof eklernis la latinan kaj la helenan kaj li cerbumis pri la eblo uzi unu el tiuj klasikaj lingvoj kiel internacian komunan lingvon. Tamen, post iom da lernado li konkludis ke ili ne estas tre facile lerneblaj, eĉ por li kiu jam parolis en pluraj lingvoj: la rusa, pola, hebrea, jida, germana kaj franca. Do, kiel estus por aliaj homoj kiuj havas nek grandan intereson pri lingvolernado nek grandan sperton pri tio? Ne, la komuna internacia lingvo devus esti pli facile lernebla ol la klasikaj lingvoj, sed tamen same neŭtrala kiel ili. Sed kiu lingvo havas tiujn trajtojn?

4.3. "Lingvo arta"

Neŭtrala lingvo, kaj samtempe facile lernebla. Ĉu tio entute eblas? Lerni lingvon ja neniam estas tre facila afero kaj ĉu troviĝas io ajn en la mondo kio estas tute neŭtrala? Verŝajne ne, sed tio ne signifas ke lingvo ne povas esti pli

facile lernebla kaj pli neŭtrala ol la etnaj lingvoj. Zamenhof multe pensis pri tio kaj alvenis al la konkludo ke "lingvo arta" estus la plej bona solvo. Per tiu esprimo, "lingvo arta", li celis lingvon kun bazo kreita de unu aŭ pluraj homoj. Jam kiel gimnaziano Zamenhof komencis eksperimenti pri kiel krei novan lingvon, sed li ofte havis dubojn ĉu eblus tion fari kun bona rezulto. Spite al ĉiuj duboj li konstante revenis al sia revo pri komuna internacia lingvo kaj plueksperimentis pri sia "lingvo arta", kio iom post iom donis rezulton...

4.4. Facila gramatiko, sed kion fari pri ĉiuj vortoj?

Lernante la anglan lingvon, fine de la gimnazio, Zamenhof inspiriĝis de la relative simpla gramatiko de la angla, kompare kun la gramatikoj de la latina kaj helena, kaj eksentis ke eblus havi lingvon kun simpla kaj klara gramatiko. Li komencis faciligi la gramatikon de sia kreata lingvo kaj post zorga laboro li estis sufiĉe kontenta pri ĝi, sed la vortaroj iĝis pli kaj pli grandaj! Kiel solvi tion, lingvo ja devas havi vorton por pli-malpli ĉio. Du rusaj ŝildoj igis lin ekpensi pri ebla solvo. La vortoj sur la ŝildoj estis "Ŝvejcarskaja" (Pordistejo) kaj *Konditorskaja* (Sukeraĵejo). Ambaŭ vortoj enhavas la sufikson "skaja" kaj Zamenhof eksentis kian grandan signifon sufiksoj povus havi. *La problemo estas solvita!* li pensis vidinte la du rusajn skribaĵojn. Poste li komencis detale kompari vortojn kaj serĉi rilatojn inter ili por decidi kiuj prefiksoj kaj sufiksoj utilis en lia lingvo. Tiu laboro montriĝis ege grava ĉar tiel Zamenhof sukcesis draste malgrandigi la nombron da lernindaj vortoradikoj.


4.5. Unua provo

Komence Zamenhof pripensis uzi mallongajn literkombinojn kiel vortojn, ekzemple *a, ab, ac, ad, ... ba, ca, da, ... e, eb, ec, ... be, ce, ... aba, aca, ...*. Sed tiun penson li tuj forĵetis ĉar montriĝis neeble memori tiajn elpensitajn vortetojn. Li tiam konvinkiĝis ke la bazo de la vortoj estu vortradikoj el la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj. Tiel la nova lingvo nature iĝus simila al la eŭropaj lingvoj. Fine de la gimnazio Zamenhof povis prezenti al la lernejoj amikoj bazon de lingvo kiun li nomis "lingwe uniwersala". Pluraj el la amikoj inspiriĝis kaj lernis la lingvon. La 5-an de decembro 1878 ili renkontiĝis por festi la pretiĝon de lia unua lingvobazo. Ili eĉ kantis himnon en la lingvo.

4.6. Elprovado kaj plibonigado

Zamenhof ne volis tuj prezenti sian lingvon en pli grandaj rondo, parte ĉar li estis tro juna por tio, sed ĉefe pro tio ke li volis unue zorge elprovi la lingvon kaj fari multajn plibonigojn. Kelkaj el la gimnazianoj kiuj lernis "lingwe uniwersal" provis paroli kun plenkreskuloj pri ĝi, sed rapide ĉesis pri tio kiam ili renkontis ĉefe primokojn. Zamenhof decidis kaŝe plulabori pri sia lingvoprojekto, ĝuste por eviti primokojn kaj aliajn problemojn (tiutempe judoj estis persekutitaj pro plej diversaj kialoj). Uzante la lingvon praktike, ekzemple por traduki grandajn verkojn, li rimarkis ke multaj aferoj, kiuj antaŭe ŝajnis bone funkciaj el teoria vidpunkto, estis ŝanĝindaj kaj li konstante faris plibonigojn en la lingvo. Iom post iom li konstatis ke necesas eviti laŭvortan tradukadon sed anstataŭe rekte pensi en la nova lingvo. Farante tion Zamenhof sentis ke lia lingvo ekhavis sian propran spiriton kaj iĝis pli kaj pli vivanta. En tiu maniero naskiĝis la bazo de la nuna Esperanto.

4.7. Lingvo Internacia



Farante sian medicinan praktikadon en Varsovio, Zamenhof ekserĉis eldonanton por prezenti la novan lingvobazon per publika libreto. Li preparis manuskripton kun la titolo "Lingvo Internacia", sed anstataŭ meti sian veran nomon sur la libron li uzis la pseŭdonimon "D-ro Esperanto". La vorto esperanto signifas personon kiu esperas kaj

tiel la pseŭdonimo ja bone priskribis la okulkuraciston el Bjalistoko: Doktoro kiu esperas je pli bona mondo, unuigo kaj paciĝo inter la popoloj. Sed li ne povis tuj eldoni la libreton, estis problemo trovi presejon kiu volis eldoni ĝin kaj ankaŭ mankis mono.

Bonŝance por Zamenhof, el pluraj vidpunktoj, li estis ĵus fianĉiĝinta kun Klara Silbner kiu subtenis lian ideon pri "neŭtrala lingvo". Somere 1887 ili ricevis finanĉan subtenon de la patro de Klara kaj ili uzis grandan parton de tiu mono por eldoni la tiel nomatan "Unuan Libron". La libreto, kiu unue aperis en la rusa kaj poste en aliaj lingvoj, enhavis i.a. antaŭparolon kun kelkaj poemoj en Esperanto, priskribon de la gramatiko kaj vortareton. La libreto iom post iom disvastiĝis al lingvemuloj kaj idealistoj, unue en Eŭropo kaj poste ankaŭ en la aliaj mondopartoj.

Sekvis hektikaj jaroj por la novgeedziĝintoj Zamenhof kun infanetoj, laboro kaj nokta Esperanto-korespondado. Ili ne estis riĉaj, sed tamen sukcesis aranĝi relative bonan



L. L. Zamenhof kaj edzino, 1887

vivon kaj en 1905 ili havis sufiĉe da mono por povi vojaĝi al Francio kaj partopreni la unuan kongreson de Esperanto en la urbo Bulonjo-ĉe-Mar. Tie regis bona etoso inter la ĉ 700 partoprenantoj el 20 landoj. Dum la inaŭguro Zamenhof emocie parolis pri sia laboro kaj kredo je unuigo de la homaro. Jen parteto de lia parolo:

"Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-ĉe-Mar kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj."

4.8. Ĉu naiva idealisto?

Zamenhof estis naiva pri pluraj el siaj ideoj kaj revoj, ekzemple li provis krei neŭtralan religian kadron en kiu ĉiuj kredantoj kaj liberpensantoj povus renkontiĝi kaj paciĝi, sed tiu projekto neniam disvastiĝis, ankaŭ ne inter Esperanto-parolantoj. Estas ĝuste ke Esperanto ne amase disvastiĝis en la mondon, sed ĝi tamen havas centmilojn aŭ eĉ milionojn da uzantoj kiuj tre ŝatas la lingvon kaj uzas ĝin en plej diversaj kontekstoj. Ne ekzistas alia lingvoprojekto kiu poste maturiĝis al vere vivanta lingvo, kun parolantoj en ĉiuj mondopartoj, ĉiutage uzata en internacia komunikado kaj en "internaciaj familioj" (kun gepatroj el malsamaj landoj kaj lingvofonoj). El tiu vidpunkto Zamenhof tre bone sukcesis kaj ni Esperanto-parolantoj sentas plej grandan respekton por li kaj lia kreema laboro. Dank' al ĝi ni spertas multe da inspiro, ĝuo kaj amikaj rilatoj kun homoj el diversaj landoj.



5. Esperanto el psikologia vidpunkto

Oni povas aliri la mondan lingvoproblemaron laŭ tre diversaj vojoj, ekzemple politika, lingvika, financa-ekonomia, ktp. Ĉi tie ĝi estas traktata el psikologia vidpunkto de la psikologo Claude Piron, kiu dum multaj jaroj ankaŭ laboris kiel tradukisto ĉe UN.

Esperantistoj ofte plendas, ke la mondo ne komprenas ilian vidpunkton, ne interesiĝas pri ĝi, aŭ ke Esperanto ne progresas sufiĉe rapide. La disvastigita ideo, en la esperantistaro, ke la lingvo ne progresas sufiĉe rapide, fontas el unu el la plej gravaj eroj de la homa psiko, nome deziro. Ili deziras, ke Esperanto progresu, kaj ili reagas al tiu deziro kiel eta infano: ili ne volas vidi la amplekson de la obstakloj, kiuj staras kiel barilo inter ilia deziro kaj ĝia plenumiĝo.

Ili do sentas frustron. Kiam ili sentas frustron, anstataŭ fronti al la fakto, ke al ili dekomence realismo mankis, kaj sekve ke la fuŝo kuŝas en ili, ili serĉas kulpulojn ekstere: tiuj estos la cetera mondo, kiu ne atentis ilin. Tio estas infaneca, sed dirante tion mi ne kritikis, mi nur esprimas ion pri la normala funkciado de la homa psiko: kiam aperas forta deziro, ni emas reagi infanece.



Claude Piron

Kial lingvo elvokas timon? Refoje, pro multaj kaŭzoj. Ekzemple, lingvo estas ligita al nia identeco. Iun tagon en la infanaĝo ni ekkonscias, ke nia medio parolas tiun aŭ tiun alian lingvon, kaj ke tio difinas nin, rilate al la cetera mondo. Mi apartenas al homa grupo difinita per la lingvo, kiun ĝi parolas. Do, en la profundo de la psiko, mia lingvo estas mi. La vasta uzo de la svisgermanaj dialektoj estas maniero diri: jen kiuj ni estas, ni ne estas germanoj. Aŭ rigardu, kiel reagas la flandroj aŭ la katalunoj: "Se oni persekutas aŭ kritikis mian lingvon, oni persekutas aŭ kritikis min."

Multaj homoj havas forĵetan sintenon al Esperanto, ĉar ili sentas ĝin lingvo sen difinita gento, do lingvo sen homa identeco, do aŭ ne lingvo, aŭ lingvo, kiu estas pli aĵa ol homa, lingvo, kiu estas, rilate al veraj lingvoj, tio, kio roboto estas, rilate al veraj homoj. Kaj tio timigas. Estas timo, ke tiu roboto, pri kiu oni diras, ke ĝi havas ambicion al universaleco, prepaŝos sur ĉiu alia lingvo, sur ĉiu popolo, sur ĉio individua kaj vivanta, detruante ĉion pasante. Tio eble ŝajnas al vi fantazia. Sed estas la vero.

La psikologia metodo nomata klinika interparolo, en kiu oni esploras, kiuj ideoj aŭ bildoj asociiĝas unu al la alia, se oni petas personon diri, kio pasas tra la menso deirante de unu difinita vorto, ĉi-kaze "Esperanto", rivelas la ekziston de tiu nekonscia timo ĉe multegaj personoj.

5.1. Lingva rilatado estas io tre kompleksa

Ankaŭ kiam mi diris, ke la mondo ne komprenas la esperantistojn, mi tuŝis psikologian aspekton de la situacio. Kial la mondo ne komprenas la esperantistojn? Ĉar la socio ne bone komprenas la lingvan situacion ĝenerale. Kial? Pro multaj kaŭzoj. Ekzemple, ĉar lingva rilatado estas io tre kompleksa, kaj ne estas facile kompreni ion kompleksan. Kiam io estas tre kompleksa, la natura maniero aliri la aferon estas simpligi ĝin. Sekve, la socio ĝenerale havas tre simpligitan bildon pri la lingva situacio en la mondo. Bildon nur skeman.

Alia psikologia kaŭzo, pro kiu la socio ne bone komprenas la lingvan problemaron, estas timo. Tio eble mirigas vin. Kaj efektive, se vi diros al politikisto, aŭ al lingvisto, aŭ fakte al iu ajn surstrate renkontita, ke unu el la kaŭzoj, pro kiuj la mondo ne solvas la lingvoproblemaron, estas timo, li aŭ ŝi rigardos vin, kvazaŭ vi estus freneza. Unue, ĉar por la alparolato lingvoproblemaro simple ne ekzistas. "La angla solvas ĝin, aŭ la tradukistoj". Kaj due, se entute estus problemo, estas klare, ke ĝi neniel rilatas al timo. "Neniu sentas timon pri lingvo. Kio estas tiu frenezaĵo?" ŝi aŭ li diros al vi. Sed multaj timoj estas nekonsciaj. Ni ne sentas ilin, kio estas bona afero, ĉar sen tio estus neeble vivi agrable. Sed fakto restas, ke tiuj timoj kaŭzas multajn fuŝtordojn, misgvidojn en nia maniero kompreni la realon.

5.2. Tabuo

Fakte, tabuo tuŝas la tutan kampon de interpopola kaj interŝtata lingva komunikado. Se vi studas la dokumentojn, kiuj estas produktataj tiukampe, vi konstatas, ĉirkaŭ 99 elcentoj prezentiĝas, kvazaŭ Esperanto ne ekzistus, kvazaŭ la homaro havus neniun sperton pri alia maniero internacie komuniki ol la kutimaj per tradukado, interpretado aŭ la uzo de prestiĝa nacia lingvo kiel la angla. Esperanto estas tabua. Kio pruvas, ke temas pri io tabua, estas la rifuzo kompari.

En scienco, kiam oni volas scii pri la valoro de io, oni ĉiam komparas al referenco. Antaŭ ol decidi pri nova medikamento, oni komparas ĝian efikecon al jam konataj substancoj. Kaj kiam oni decidis fari tiun aŭ alian grandan laboron, ekzemple konstrui novan stadion, kion oni faras? Oni lanĉas ofert-alvokon. Oni proponas al la diversaj firmaoj submeti projekton, kaj oni komparas la diversajn ofertojn por akcepti la plej racian rilate al ĝiaj kostoj kaj al la aliaj kriterioj, kiujn necesas konsideri. Tio estas la normala proceduro.

Fakte ekzistas tuta scienca metodo pri la arto decidi elektante la plej bonan manieron atingi difinitan celon. Tiun sciencon metodon oni nomas "operacia esplorado" ("operations research", "recherche opérationnelle"). Se oni aplikas la regulojn de operacia esplorado al la lingvoproblemo, oni konstatas, ke, el ĉiuj rimedoj nuntempe observeblaj en la praktiko, la optimuma, por atingi la celon estas Esperanto.

Sed por tion trovi, necesas kompari la diversajn sistemojn unu al la aliaj, do vidi objekte, en la praktiko, (surterene, kiel oni diras), kiel Esperanto prezentiĝas kompare al gestoj, al balbutado en lingvo malbone regata, al la uzo de la angla, al tradukado de dokumentoj kaj interpretado de paroladoj, ĉu samtempa, ĉu posta, al uzo de la latina, ktp. Nur tia komparo ebligas konkludi, kiu estas la plej bona sistemo.

Sed kvankam miloj kaj miloj da paĝoj troviĝas en dokumentoj pri la lingva situacio, jen en UN, jen en Eŭropa Unio, jen en lingvikaj fakoj de universitatoj ktp, la dokumentoj, kiuj aliras la problemaron surbaze de komparo inkluzivanta Esperanton estas malpli nombraj ol la fingroj de unu homo. Ĉar komparo de la diversaj eblaj solvoj al problemaro estas io tiel ofta alikampe, ĝia foresto en la kampo de internacia lingva komunikado montras, ke agas tabuo.

5.3. En kio radikas la tabuo?

Kial tiu tabua aliro al la lingvoproblemaro? Denove la kaŭzoj estas multaj. Estas politikaj kaŭzoj. La ideo, ke "ordinaraj homoj" povu senbare komuniki de popolo al popolo malplaĉas al multaj ŝtatoj. Estas sociaj kaŭzoj. Tiu sama eblo malplaĉas al la privilegiitaj sociaj tavoloj. Homoj, kiuj scias sufiĉe bone la anglan aŭ alian gravan lingvon, havas multajn avantaĝojn super homoj, kiuj scipovas nur kelkajn lokajn lingvojn, ili tute ne deziras perdi tiujn avantaĝojn. Tio estas aparte videbla en la t.n. Tria Mondo.

Sed mi opinias, ke la ĉefaj kaŭzoj de la tabuo estas psikaj. La kerno de la problemo kuŝas en la emocia pezo, ŝargo, etoso de la koncepto "lingvo", en ĝia povo vibrigi tre profundajn fibrojn de nia animo. Ni pensas per konceptoj aŭ vortoj. Kaj la vortoj aŭ konceptoj ne estas nur intelektaj aferoj, ili havas ian emocian, ian sentan etoson. Ne ĉiuj, sed multaj. Se mi diras "milito" aŭ "mono" aŭ "patrino" aŭ "sekso" aŭ "atomenergio", io vibras profunde en vi, kvankam vi tion ĝenerale ne konscias. Alivorte, ni ne estas indiferentaj fronte al granda parto de niaj konceptoj, ĉefe al tiuj, kiuj estas iel ligitaj al niaj deziroj, bezonoj, aspiroj, plezuroj, suferoj, potenco, ktp.

Inter tiuj konceptoj kun forta emocia etoso troviĝas la koncepto "lingvo". Kial? Ĉar la lingvo elvokas la fakton kapabli kompreni sin, kaj la eblo esti komprenata estas unu el la plej bazaj deziroj de ĉiu homo. Kiam mi havas ian turmentan zorgon, aŭ suferon, se mi povas paroli pri ĝi al iu, kiu aŭskultos min kaj reagos komprene, mi sentos min helpata, okazos ia kundivido de la zorgo aŭ de la sufero, tiel ke mi ne plu sentos min sola, mi fartos pli bone kun ĝi.

Kiam bebo suferas kaj krias, tre ofte, pro nekomprene, la reago de la apuda plenkreskulo mistrafas, aŭ tute ne venas reago, krom, survizaĝe, esprimo de senhelpeco. Sed kiam la infaneto akiris lingvon, kaj povas diri: "Doloras al mi en la orelo", la reago de la plenkreskulo estas tute alia. Okazas vera

komunikado, kiu ŝanĝas la vivon. Tial ke tiu komunikado plej ofte kaj plej save disvolviĝas kun la patrino, la emocia etoso de la koncepto "lingvo" inkluzivas la sentojn pri ŝi. Pro tio la plimulto el la lingvoj diras "patrina lingvo", kiam fakte temas pri la gepatra aŭ la media lingvo.

Vidu, kiel emocie la homoj reagas, kiam aperas propono ŝanĝi la ortografion. Rigardu atente la argumentojn, kaj vi vidos, ke nenio vere racia intervenas tie. Temas simple pri emocioj, la emocioj, kiujn ĉiam vibrigas la koncepto "lingvo".

5.4. Kaj "patro" kaj "patrino"

Esperanto aperas kiel monstro, ĉar oni diras, ke ĝin kreis unu viro. Alivorte, ĝi havas "patron", sed ne "patrinon". Ĝi estas la monstra produktaĵo de iu soleca perversulo. Al tiu ideo kontribuas multaj difinoj, troveblaj en vortaroj, enciklopedioj, prilingvaj libroj aŭ Esperantistaj informiloj, laŭ kiuj "Esperanto estis kreita de Zamenhof en 1887". Fakte, Esperanto ne kreĝis en 1887. En 1887 aperis semo de lingvo, kiu dum multaj jaroj antaŭe kreskis kaj transformiĝis en la menso de Zamenhof kaj sur liaj kajeroj.

Post tiu longa procezo, kiu estas komparebla al la procezo per kiu laŭgrade kreĝas semo en planto, la projekto publikiĝis, tio signifas, la semo estis ĵetita. Sed tiu semo povis iĝi io vivanta nur, se grundo akceptis ĝin. Kaj tiu grundo estas la "patrino" de Esperanto, tio estas la komunumo de tiuj unuaj idealistoj, kiuj akceptis la semon, kaj provizis ĝin per la medio, en kiu ĝi povis kreski, transformiĝi kaj fariĝi io sufiĉe vivkapabla por vivteni sin sendepende de iu ajn individuo.

Esperanto, kia ĝi estas uzata nun, ne estas la verko de Zamenhof, ĝi estas lingvo, kiu disvolviĝis surbaze de la projekto de Zamenhof per jarcento da konstanta uzado inter homoj ege diversaj. Ĝi estas lingvo, kiu disvolviĝis tute nature, per uzado, per verkado, per alterno de proponoj kaj kontraŭproponoj, plej ofte nekonsciaj. Ĝi ne estas monstro, kiun estigis iu homo sola, ĝi havas "patron", jes ja, mirindan "patron", "patron", kiu sukcesis meti en ĝin nekredeble taŭgan vivpotencialon, sed ĝi havas ankaŭ "patrinon", kiu flegis ĝin ame, kaj kiu, multe pli ol la "patro" sola povis, donis al ĝi vivon.

5.5. En longa perspektivo

Vi vidas, ke la psikologiaj aspektoj de Esperanto, kaj de la monda lingvoproblemaro, estas multe pli kompleksaj ol oni unuavide imagus. En la psiko de la plej multaj individuoj troviĝas granda rezisto al la ideo mem de lingvo internacia (kiu ne estas ankaŭ nacia lingvo). Pro tiu rezisto, preskaŭ neniu en la politika, socia kaj intelekta elito akceptas serene esplori la aferon.

La rezisto plu daŭros kaj estos akra, certe, eĉ se nur ĉar oni povas percepti ion nur kiam oni estas tiurilate preta, tiel ke, nuntempe, multaj homoj simple ne aŭdas, kion oni diras pri Esperanto: ilia menso ne estas preta, do la frazoj preterpasas sen penetri ĝin. Jes, la rezisto plu estos forta. Sed ĝi verŝajne ne povos superi la faktojn en longa perspektivo.

(Mallongigita versio de prelego farita de Claude Piron en 1998.)

6. Kutimaj demandoj pri Esperanto

En tiu ĉi sekcio vi trovas respondojn al kelkaj kutimaj demandoj pri Esperanto.

6.1. Kial oni nomas la lingvon Esperanto?

Komence la lingvo nomiĝis nur "Lingvo Internacia" – internacia lingvo. Kiam Zamenhof prezentis la lingvon, li uzis la pseŭdonimon "Doktoro Esperanto" (signifas: doktoro kiu esperas). Pro tio homoj kelkfoje parolis pri "la lingvo de D-ro Esperanto" kaj iom poste diris nur "Esperanto", kaj tio iĝis la kutima nomo de la lingvo.



6.2. Kiom da homoj parolas Esperanton?

Ne estas klare kiel nombri la Esperanto-parolantojn, ĉar ne ĉiuj Esperanto-parolantoj estas membroj en iu organizo. Krome dependas de la difino de "paroli Esperanton": ĉu oni nombru nur altnivelajn regulajn parolantojn, aŭ ĉu oni nombru ĉiujn kun baza scio de la lingvo, eĉ se ili tre malofte uzas Esperanton. La taksoj de Esperanto-parolantoj en la mondo do multe varias, de kelkdek miloj ĝis kelkaj milionoj. Ĉiuokaze estas sufiĉe multaj Esperanto-parolantoj mondscale por havi viglan kaj internacian komunumon.

6.3. Al kiuj lingvoj Esperanto plej similas?

Plejparto de la vortradikoj venas el la eŭropaj lingvoj, precipe la latinidaj, sed la gramatiko de Esperanto havas plurajn trajtojn, kiuj ne estas tipaj por eŭropaj lingvoj, sed faras ĝin iom simila al ekzemple la turka, svahila aŭ eĉ la ĉina.



6.4. Ĉu estas facile lerni Esperanton?

Kompare kun la naciaj lingvoj, jes. Sed, kiel ĉiam, multo dependas de la individuo mem, kaj kiom da aliaj lingvoj oni jam lernis. Lerni novan lingvon ĉiam estas defio kaj neniel "tre facile", laŭ nia sperto. Tio validas ankaŭ por Esperanto, kvankam ĝi klare estas malpli malfacila ol la naciaj/etnaj lingvoj kutime estas. Ankaŭ por homoj kiuj neniam vere sukcesis ellerni fremdan lingvon, Esperanto estas lernebla! Sed, kompreneble necesas multe da lernado kaj ekzercado se oni volas flue kaj korekte uzi la lingvon.

6.5. Kial lerni Esperanton?

Ekzistas diversaj kialoj kial homoj eklernas Esperanton. Lingvemaj personoj ofte scivolos pri la gramatiko de Esperanto kaj tiel komencas studi la lingvon. Aliaj interesiĝas pri Esperanto ĉar ili ne sukcesis lerni iun fremdan lingvon kaj do volas provi pli facilan lingvon. Iuj aŭdis pri la "interna ideo" kaj pro ĝi lernas Esperanton por en tiu maniero subteni pli pacan kaj kunligitan mondon. Junuloj ofte interesiĝas pri vojaĝoj al aliaj landoj por tie trovi novajn amikojn kaj Esperanto estas tre bona alternativo por tio.

6.6. Kiel lerni Esperanton?

Se vi havas bonan aliron al interreto ni rekomendas al vi komenci ĉe www.lernu.net kie troviĝas pluraj interagaj kursoj por komencantoj en multaj lingvoj. Se vi preferas kurson en libroformo tia estas mendebla per www.???? [depende de la lingvo-versio]. Se vi ŝatus eklerni Esperanton en ĉeesta lingvo-kurso vi povas kontakti [nomo kaj retpoŝtadreso kaj/aŭ telefonnumero]. En pluraj landoj kaj urboj oni regule okazigas ordinarajn Esperanto-kursojn. Kiam vi scios iom da Esperanto, bonas ekuzi la lingvon kun aliaj, ĉu per interreto, ĉu en Esperanto-renkontiĝoj.

6.7. Ĉu Esperanto havas iujn simbolojn?

Jes, estas kelkaj. La verda stelo estas la plej malnova kaj plej vaste uzata, i.a. por la Esperanto-flago. La verda koloro estas simbolo de "espero" kaj la kvinpinta stelo simbolas la kvin kontinentojn. Alia, pli nova, estas la tiel nomata "jubilea simbolo" kiu aperis kiel rezulto de konkurso pro la centjariĝo de Esperanto.

6.8. Kial kelkaj lingvistoj faris negativajn eldirojn pri Esperanto?

Tiuj kiuj plej bone komprenas la kompleksecon de lingvo estas la lingvistoj. Eble ĝuste pro tio, tiom multaj el ili, cetere ege kompetentaj homoj, ne povas kredi, ke Esperanto povas funkcii kiel plena, vivanta lingvo, kaj do esti atentinda kaj esplorinda. Lingvo estas io tiel kompleksa kaj delikata, ke

la apero de vera, riĉa, vivanta lingvo bazita sur projekto de unu junulo (Zamenhof estis 27-jara kiam li prezentis Esperanton post pli ol dekjara laboro pri ĝi) estas afero ege neprobabla. Nature do oni skeptikas. Sed se oni kontrolas la realon, oni rimarkas, ke Esperanto mirinde bone funkcias por internacia komunikado. Estus tre bone se pli da lingvistoj kaj esploristoj volus fari studojn kaj esploron pri Esperanto en la estonteco.

6.9. Ĉu eblas lerni Esperanton en universitatoj kaj lernejoj?

En kelkaj landoj jes. Multaj esperantistoj argumentas ke lernado de Esperanto en la baza lernejo helpus al la lernantoj poste pli facile lerni aliajn fremdajn lingvojn pro tio ke la lernantoj ricevas bonan memfidon pri lingvolernado lernante la relative facilan Esperanton kaj ke ili ankaŭ ekhavas pli bonan komprenon pri gramatikaj strukturoj dank' al la klareco de la gramatiko de Esperanto. Ekzistas pluraj indikoj pri tio, kaj estus interese se esploristoj farus studojn pri la lernofaciliga (propedeŭtika) valoro de Esperanto.



6.10. Ĉu oni povas aŭdi de kiu lando venas Esperanto-parolanto?

Ofte oni povas diveni de la akĉento de kiu lando venas persono kiu parolas en Esperanto, sed ne ĉiam, ekzistas ankaŭ tiuj kiuj havas "neŭtralan" elparolon.

6.11. Kiom da denaskaj Esperanto-parolantoj ekzistas?

Verŝajne ekzistas ĉirkaŭ 1000 homoj kiuj parolas Esperanton kiel unu el siaj gepatraj lingvoj. Ofte estas tiel ke la gepatroj renkontiĝis dum iu Esperanto-aranĝo kaj estas el malsamaj landoj. Ili uzas Esperanton inter si hejme kaj kiam ili poste ricevas infanon ili volas pluuzi Esperanton inter si. La verŝajne plej ofta modelo estas ke unu gepatro ĉiam uzas Esperanton kun la infano, la alia gepatro, kiu estas enmigrinto, uzas sian denaskan lingvon kun la infano kaj en la socio la infano uzas la lokan/nacian lingvon. En tiu maniero la infano iĝas denaske trilingva.

6.12. Ĉu ne estus pli bone krei novan eĉ pli justan lingvon por internacia komunikado?

Kunmeti bonan lingvobazon ne estas facila afero. La lingvistoj, kiuj plej bone scias pri lingvoj, ne nepre havas talenton pri krei lingvon, ilia specialiĝo ja temas pri analizi lingvojn. Krei kaj analizi estas sufiĉe malsamaj aferoj. Pluraj homoj kunmetis lingvobazon, ankaŭ grupo da lingvistoj provis, sed la rezultoj ĝis nun ne iĝis pli sukcesaj ol Esperanto. Pensu pri Mozart kaj muzikkreado, ne ofte aperas homoj kun tia talentego! Iom simile pri Zamenhof. Li havis eksterordinaran talenton pri lingvokreado kaj sukcesis mem kunmeti lingvobazon kiu montriĝis multe pli bona ol aliaj provoj. Krome, vivigo de nova lingvobazo postulos longan tempon da ĉiuflanka kaj tutmonda praktikado post ĝia publikiĝo. Kaj sen ideologia bazo komparebla al tiu, kiun Zamenhof havigis al Esperanto, ĝi havas malmultajn ŝancojn fariĝi vere vivanta lingvo kaj akiri por si la necesan socian bazon. Kun Esperanto la procezo jam okazis kaj la lingvo nun estas preta. Ne perfekta, sed tamen tre bona por internacia kaj egaleca komunikado.

6.13. Ĉu ne sufiĉas la angla por internacia komunikado?

La angla estas tre utila por internacia komunikado en multaj situacioj. Sed fakto restas ke ne ĉiuj sukcesas atingi altan nivelon en tiu lingvo, eĉ post plurjara lernado. Aparte por tiuj kies gepatra(j) lingvo(j) ne similas al la angla estas malfacile atingi altan nivelon. (Se vi iam estis en ekzemple Koreio aŭ Turkio vi scias pri kio ni parolas.) Esperanto estas pli facile lernebla ol la etnaj lingvoj kiam temas pri lernado de fremda lingvo kiel junulo aŭ plenkreskulo. Krome, Esperanto ne estas ligita al iu aparta nacia kulturo kio estas granda avantaĝo por lingvo kiu funkcias kiel ponto inter ĉiuj popoloj kiuj tiel komunikas sur egala bazo. (Vidu ankaŭ la parton 1.6.)

6.14. Ĉu Esperanto ne jam havis sian ŝancon?

Estas ĝuste ke Esperanto, en la komenco de la 20-aj jaroj, preskaŭ estis elektita de la Ligo de Nacioj (antaŭulo de UN) kiel unu el la laborlingvoj de tiu organizo kaj ke pluraj politikistoj interesiĝis pri Esperanto dum la 30-aj kaj 40-aj jaroj. Hodiaŭ tre malmultaj politikistoj interesiĝas pri Esperanto. Povas esti ke Esperanto neniam denove havos ŝancon iĝi laborlingvo de iu granda internacia organizo. Povas ankaŭ esti ke la situacio ŝanĝiĝos iam en la estonteco kaj ke Esperanto iĝos pli kaj pli populara inter homoj kiuj interesiĝas pri kreado de nova mondkomunumo kun pli pacaj kaj proksimaj rilatoj inter la popoloj. Pri la estonteco malfacilas certe scii. Sed eblas esperi... Ni esperantistoj bonas ĝuste pri tio! (La vorto "esperanto" signifas personon kiu esperas.)

7. Lokaj informoj pri Esperanto

Tiu ĉi broŝuro estas nur labormaterialo por sekva traduko de ĝia enhavo en diversajn naciajn lingvojn. Anstataŭ la suba foto (partoprenantoj de Ago-Semajno en Liptovský Mikuláš, Slovakio) aperos ĉi tie la koncernaj lokaj informoj.

7.1. Organizoj kaj kluboj

[via teksto pri organizoj/kluboj en via lando]

7.2. Kursoj

[via teksto pri kursoj en via lando]

7.3. Aranĝoj

[via teksto pri aranĝoj en via lando]

7.4. Libroj pri Esperanto

[informoj pri vialingvaj Eo-libroj]

7.5. Librovendejoj

[via teksto pri kiel aĉeti Eo-librojn vialande]

7.6. Kontaktinformoj

[via teksto pri kontaktinformoj]



www.lernu.net

lernu! estas multlingva paĝaro, kiu helpas al retemuloj informiĝi kaj lerni Esperanton, senpage kaj en facila maniero.

En la paĝaro estas diversnivelaĵoj kursoj, vortaroj en multaj lingvoj, superrigardo de la gramatiko, aŭskulteblaj rakontoj kun bildoj, tujmesaĝilo por rekta komunikado, forumoj kaj multo alia!

Esperanto estas ... www.esperantoestas.net

Konatiĝu kun la internacia lingvo Esperanto pere de ses mallongaj kaj viglaj filmetoj!

Esperanto estas ...



- ... lingvo taŭga por ĉio (Parto 1 - 01:43 min)
- ... lingvo kun multaj trajtoj (Parto 2 - 08:01 min)
- ... lingvo uzata plurmaniere (Parto 3 - 06:23 min)
- ... lerninda kaj lernebla por ĉiuj (Parto 4 - 13:22 min)
- ... lingvo kun bunta movado (Parto 5 - 04:12 min)
- ... lingvo de la estonteco (Parto 6 - 09:31 min)



ESPERANTO ESTAS INTERNACIA LINGVO UZATA EN ĈIUJ MONDOPARTOJ



*"Mi sentas min parto de
tutmonda komunumo"*

Erin Piatetski,
Usono



*"Esperanto estas parto de
mia normala vivo"*

Renato Corsetti,
Italujo

*"Mia ĉefa intereso
en Esperanto estas
ĝia kultura flanko"*

Rogener Pavinski,
Brazilo



*"Jam de 7 jaroj Esperanto
estas mia ĉefa okupo"*

Katalin Kováts,
Nederlando / Hungario



*"Esperanto igis min
mondcivilitano"*

Jean Codjo,
Kanado / Benino



*"Esperanto multe fortigis
mian intereson pri aliaj
landoj kaj kulturoj"*

Marcos Cramer,
Germanujo

*"Dank' al Esperanto mi ofte
ĝuis intiman kontakton
eksterlande"*

Satoo Reiko,
Japanio



*"Esperanto malfermis al mi
novan rigardon"*

Trinh Hong Hanh,
Vjetnamio



*"Lernado de Esperanto
kondukis min al nova
mondoparto"*

Russ Williams,
Polujo / Usono



*"Esperanto troviĝas
ankaŭ en vilaĝoj sen
elektro"*

Vladka Chvátalová,
Belgio / Ĉeĥio

*"Esperanto alportas al mi
internacian amikecon"*

LI JIANHUA,
Ĉinio



*"Esperanto multe faciligas
internaciajn interŝanĝojn"*

Kong Kil-yoon,
Koreio



*"Mi estis ravita de la interna
logiko de Esperanto"*

Zsófia Kóródy,
Germanio / Hungario



*"Por mi Esperanto
estas inspiro"*

Hokan Lundberg,
Svedio

**EN TIU ĈI BROŜURO VI POVAS LEGI PRI ESPERANTO
KAJ KIEL ĜI ESTAS UZATA DE HOMOJ EL DIVERSAJ LANDOJ**